

EL POPOLA CINIO

中國新道


7

1974





Tekstilaj laboristinoj en la festa celebrado



Prezidanto Maŭ Zedong Intervidiĝis kun Prezidanto Senghor, Lia Edzino kaj Aliaj Honorindaj Gastoj

Antaŭtagmeze de la 7-a de majo Prezidanto Maŭ Zedong intervidiĝis kun Leopold Sedar Senghor, prezidanto de la Respubliko de Senegalio, lia edzino, liaj akompanantaj registaraj ministroj de Senegalio kaj ĝia ambasadoro al Ĉinio.

Kiam Prezidanto Senghor kaj lia edzino, Ministro de Fremdlandaj Aferoj Assane Seck kaj lia edzino, Ministro Babacar Ba, Ministro Adrien Senghor kaj Ambasadoro Aly Dioum eniris en la salonon, Prezidanto Maŭ alpaŝis kaj manpremis kun ili por esprimi bonvenigon.

Prezidanto Maŭ kaj Prezidanto Senghor faris intiman kaj amikan interparoladon.

En la intervidiĝo partoprenis ankaŭ Ĉefministro Ĝou Enlaj, Viceprezidanto Vang Hongven, Viceĉefministro Li Hiannian, Asistanto de ministro Vang Hajjong, kaj Ki Gonghua, Luo Hju kaj Tang Venŝeng.



Prezidanto Maŭ Zedong Intervidiĝis kun Ĉefministro Bhutto, Lia Edzino kaj Aliaj Honorindaj Gastoj

Vespere de la 11-a de majo, Prezidanto Maŭ Zedong intervidiĝis kun Ĉefministro de la Islama Respubliko de Pakistano Zulfikar Ali Bhutto, lia edzino kaj liaj ĉefaj akompanantoj.

La intervidiĝon ĉeestis Jalaluddin Abdur Rahim, ministro de produkto, prezidantaj aferoj kaj komerco; Aziz Ahmed, ministro de la nacidefendo kaj fremdlandaj aferoj; Mohammad Yusuf Buch, speciala asistanto de la ĉefministro; Meraj Khalid, Mumtaz Ali Bhutto kaj Yusuf Khattak, membroj de la Nacia Asembleo; Nabi Baksh Zehri, senatano; Agha Shahi, sekretario de la Ministerio de Fremdlandaj Aferoj kaj Majoro-genelaro A. Rahim Khan, estro de la Ĝenerala Stabo de la Pakistana Armeo. Ĝin partoprenis ankaŭ Mumtaz Ali Alvie, ambasadoro de Pakistano al Ĉinio.


Kiam Ĉefministro Bhutto, lia edzino kaj aliaj honorindaj gastoj eniris en la salonon, Prezidanto Maŭ manpremis kun ili por esprimi bonvenigon. Poste Prezidanto Maŭ interparolis kun Ĉefministro Bhutto en intima kaj amikeca atmosfero.

La intervidiĝon ĉeestis ankaŭ Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj, Vicprezidanto Vang Hongven, Vicĉefministro Deng Hiaŭping, Asistanto de ministro Vang Hajjong, Tang Venŝeng kaj Ĝang Hangi.

Kritiko al Lin Biaŭ kaj Konfucio akcelas la produkton de la ĉina industrio

Junaj laboristoj de la Ŝtala Fabriko de Fuŝun de Liaŭning-provinco skribas dazibaojn por kritiki Lin Biaŭ kaj Konfucion.





La Fabriko de Sintezo Amoniako de Ĉangtaj-gubernio de Fugian-provinco superplenumis produktan planon. Jen granda kvanto da kemia sterko fonte ekspediĝas al la kamparo.

Altiginte sian konscion en la kritikado al Lin Biaŭ kaj Konfucio, la kadroj de la Kotontekstila Fabriko de la urbo Hinhiang de Henan-provinco sin apogas sur la laboristaj amasoj, plifortigas gvidadon al la produkto kaj aktive partoprenas en laboro. Jen Ĝaŭ Kin (la maldekstra), vicesekretario de la kompartia komitato de la fabriko, laboras en laborejo.






Televizila Laborejo de la Ŝanhaja Radioaparata Fabriko ekfunkciinta kurantjare antaŭdate pli produktan planon de la unua trimestro.





Puŝate de la movado de kritikado al Lin Biaŭ kaj Konfucio la vastaj amasoj de oficistoj kaj laboristoj de Kajluan-karbominejo de Hebej-provinco superplenimis la ŝtatan planon de la unua trimestro de la kuranta jaro. Jen paperfolio pri ĝojinda nova atingo surskribita de laboristoj al la kompartia komitato de la karbominejo.

e antaŭdate plenumis



En la movado de kritiko al Lin Biaŭ kaj Konfucio la kadroj kaj laboristoj de la Pekina Popola Maŝinfabrika batalas en unuiĝo kaj antaŭdate plenumis la produkta planon de la ŝtato. Jen laboristoj kontrolas presmaŝinon antaŭ ekspedo.

Ĝoja celebrado de la internacia festo de laboruloj

EN la bona situacio de venka disvolviĝo kaj profundiĝo de la movado de kritiko al Lin Biaŭ kaj Konfucio, la laboristoj kaj aliaj laborantaj popoloj de nia lando kun plena vigecko kaj alta batalvolo ĝoje celebris la Unuan de Majo, la Internacian Feston de Laboruloj, varme aklamante la grandan venkon de la revolucia linio de

Prezidanto Maŭ, la grandan venkon de la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj novajn venkojn akiritajn sur diversaj frontoj sub kuraĝigo de la spirito de la Dekka Kongreso de la Partio, kaj decidis konduki ĝis la fino la batalon de kritiko al Lin Biaŭ kaj Konfucio sub la unueca gvido de la partiaj komitatoj, laŭ la instrukcio de

La festa celebrado en la Kultura Palaco de Laboranta Popolo en Pekino





La pekinaj infanoj varme celebras la Majfeston dancante kaj kantante.

Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio.

En la ĉijara laborula festo ĉie en la lando regis revolucia atmosfero de unuiĝa batalo. Sub la gvido de la partiaj komitatoj de diversaj niveloj, la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj, soldatoj, revoluciaj kadroj kaj revoluciaj intelektuloj diligente studas Marksismon-Leninismom-Maŭzedongpenson kaj lige kun la aktualaj bataloj inter la du klasoj kaj du linioj, profunde kritikis la kontraŭrevolucionan krimon de Lin Biao, kiu predikis “sinregi por restarigi la etiketon” imitante Konfucion, kaj lian reviziisman linion, kaj profunde kritikis doktrinojn de Konfucio kaj Mencio — la ideologion de la reakciaj dekadencaj klasoj. Tio forte rebatis la reakcian pensfluron de la en- kaj

ekster-landaj klasaj malamikoj, kiuj neas la Grandan Proletan Kulturajn Revolucion, malamas socialismajn novajn aferojn kaj klopodas por restaŭri kapitalismon, pluapasa levis la konscion de bataloj inter la du klasoj kaj du linioj, vekis revolucionan entuziasmon kaj firmigis plie la revolucionan unuiĝon. Je la 1-a de majo, en ĉiuj provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de la tuta lando ĝenerale okazis diversaj celebraj aktivadoj.

En la celebraj aktivadoj de la ĉefurbo partoprenis respektive gvidantoj de la Partio kaj ŝtato Ĝou Enlaj, Vang Hongven, Je Gianjing, Ĝu De, Ĝang Ĉunkiaŭ, Giang King, Jaŭ Venjuan, Li Hiannian, Deng Hiaŭping, Ĉen Hilian, Gi Dengkuj, Hua Guofeng, Vang Donghing, Vu De, Su

Ĝenhua, Ni Ĝifu, Ĉen Jun, Li Fuĉun, Hju Hiangkian, Nie Ĵongĝen, Ngapo Ngavang-ĝigme kaj Ĝoŭ Gianĵen. La festan celebradon de Pekino ĉeestis ankaŭ vicprezidantoj de la Tutlanda Komitato de la Politika Interkonsiliĝa Konferenco Teng Daj-juan, Ŝen Janbing kaj Hju Deheng. Kamaradoj Li Deŝeng, Vej Guoking, Hju Ŝijoŭ, Ĉen Jongguj, Vu Guĵhian kaj Sajfudin partoprenis en la celebraj aktivadoj de la amasoj respektive en Ŝenjang, Nanning, Kantono, Tajjuan, Hi-an kaj Urumĉi. Ankaŭ respondecaj kamaradoj de la Partio, registaro kaj armeo de diversaj lokoj ĝoje pasigis la festotagon kune kun la popolamasoj.

En la festa ĉefurbo ĉie flirtis ruĝaj flagoj, kaj la tuta urbo portis sur si festan veston. Kvincentmil laboristoj, kamparanoj, soldatoj, revoluciaj kadroj kaj revoluciaj intelektuloj ĉeestis la grandiozajn amuzkunvenojn en ses grandaj parkoj de Pekino. Centoj da amatoraj, profesiaj kaj infanaj artaj trupoj prezentis teatraĵojn, dancojn,

kantojn kaj aliajn muzikaĵojn, ĉjuĵi-ojn kaj aliajn programerojn kun kritiko al Lin Biaŭ kaj Konfucio kiel ĉefa enhavo, kaj plene esprimis la decidon de la ĉefurbaj popolanoj konduki ĝis la fino la batalon de kritiko al Lin Biaŭ kaj Konfucio. En nia plej granda urbo Ŝanhajo ĉirkaŭ miliono da laboristoj kaj aliaj laborantaj amasoj partoprenis en diversaj celebraj aktivadoj. Laboristoj el metalurgia, tekstila kaj elektromekanika branĉoj ĝoje kunestis en la Hudong-a Laborista Kultura Palaco en la ĉefa industria kvartalo, kaj interŝanĝis sperton pri lerno de verkoj de Marks, Engels, Lenin, Stalin kaj Prezidanto Maŭ kaj pri profunda kritiko al Lin Biaŭ kaj Konfucio. Ili esprimis, ke ili daŭre profundigos la kritikadon kaj energie klopodos por plifirmigi kaj disvolvi la grandajn fruktojn de la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj plenumi diversajn batalajn taskojn elmetitajn de la Deko Kongreso de la Partio. La diversaj celebraj aktivadoj en Tiangin, Ŝenjang, Vuhan, Kantono, Hi-an, Ĉengdu kaj aliaj grandaj urboj vivece



Tiangin-aj laboristinoj en la amuzkunveno de la festotago



La fremdlandaj amikoj en Pekino rigardas artan prezentadon en la Somera Palaco.

spegulis la revolucian etoson de unuiĝa batalo en profunda disvolvo de la movado de kritiko al Lin Biaŭ kaj Konfucio. Celebrante la festotagon la vastaj laboristoj kaj aliaj laborantaj amasoj esprimis, ke ili nepre ludos pli bone la rolon de la ĉefaj fortoj en la nuna movado kaj kondukos tiun grandan politikan kaj ideologian batalon ĝis la fino sub la unueca gvido de la partia komitato.

En la landlimaj kaj marbordaj regionoj de Hingiang, Interna Mongolio, Tibeto, Hejlonggiang kaj Fugian la diversnaciecaj popolanoj kaj gemilicanoj partoprenis en festaj celebraj aktivadoj kune kun garnizonantaj komandantoj kaj batalantoj de ĈPLA. Ili diris, ke la batalo kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio certe plifortigos la grandan unuiĝon de la diversnaciecaj popolanoj de nia lando kaj akcelos disvolviĝon de revolucio kaj konstruado de nacimalplimultaj regionoj. Ili esprimis, ke ili pli kompakte unuiĝos ĉirkaŭ la Centra Komitato de la Partio kun Prezidanto Maŭ kiel la ĉefo, kaj prenante kritikon al Lin


Biaŭ kaj Konfucio kiel potenca movforton, plifortigos konstruadon de la landlimaj regionoj kaj preparadon kontraŭ milito, altigos singardemon por defendi la patrolandon kaj esti ĉiam pretaj ekstermi invadontajn malamikojn kaj nepre liberigos Tajvan-provincon, la sanktan teritorion de la patrolando.

La celebraj aktivadoj de diversaj lokoj spegulis novajn ĝojindajn sukcesojn atingitajn de la vastaj amasoj en tenado de revolucio, stimulado de produkto, aliaj laboroj kaj preparado kontraŭ milito dum la movado de kritiko al Lin Biaŭ kaj Konfucio. Sub la antaŭenpuŝo de la movado la totala produkt valoro de la industrio en Pekino en la unuaj kvar monatoj, ĉijare, plimultiĝis je 12.5% kompare kun tiu de la plej alta nivelo en la historio kreita en la sama periodo de 1973. Dank' al kritiko al Lin Biaŭ kaj Konfucio la heroaj petrolaj laboristoj de Daking fariĝis pli energioplennaj. De januaro ĝis aprilo ĉijare la produktokvanto de nafto de Daking-petrolkampo plimultiĝis je 26% kompare kun

tiu en la sama periodo en 1973, tio estas kvinoblo de tiu en 1965. Tiamaniere la ruĝa flago de Daking starigita de Prezidanto Maŭ fariĝis ankoraŭ pli freŝa. Ĝoje pasigante la festotagon la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj kadroj de diversaj lokoj esprimis, ke ili nepre prenos la movadon de kritiko al Lin Biaŭ kaj Konfucio kiel movforton, levos la amasan movadon de “**lerno de Daĝaj en agrilkulturo**” al nova nivelo, plie disvolvos la amasan movadon de “**lerno de Daking en industrio**”, energie efektivigos pliprodukton kaj ŝparadon, plenumos kaj superplenumos la nacian ekonomian planon de 1974 kaj gajnos novan venkon de la socialisma konstruado.

Fremdlandaj amikoj vizitantaj en Pekino, Ŝanhajo, Kantono kaj aliaj lokoj invite ĉeestis celebrajn aktivadojn kaj estis varme akceptataj de la vastaj amasoj de nia lando. Multaj amikoj venintaj de Azio, Afriko kaj Latinameriko kun plena patoso ĝoje kantis kaj dancis kune kun la amasoj. La celebradon ĉeestantaj laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj de nia lando elkore dankis diverslandajn popolojn pro ilia subteno al la ĉina popolo kaj esprimis sian firman subtenon al popoloj de la tria mondo kaj aliaj popoloj en ilia batalo kontraŭ koloniismo, imperiismo kaj hegemoniismo.

Ankaŭ multaj samlandanoj el Tajvan, Hongkong kaj Aŭmen kaj patriotaj ĉinaj elmigrintoj ĉeestis la celebrajn aktivadojn por pasigi la festotagon kune kun la popolo de la patrolando.



La laborantaj popolanoj de Ŝanhajo celebras la Internacian Feston de Laboruloj.



La elmigrintaj ĉinoj el Tajvan-provinco loĝantaj en Japanio ĝoje celebras la festotagon kune kun samlandanoj el Tajvan laborantaj en Pekino.



Vang Ĉengfu, sekretario de la kompartia filio de Liuĝuang-brigado de Daĝaj-komunumo, kune kun komunumanoj kritikis la ekstreme dekstran esencon de la reviziisma linio de Lin Biaŭ.

estis multe disvolvita. En 1972, direktate de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, la popolo de Hijang plene disvolvis la superecon de la socialisma kolektiva ekonomio kaj venkis la grandan sekecon, kaj la totala produktokvanto de greno de la gubernio je 72% superis tiun de 1966. Ĉiuj kadroj kaj komunumanoj diris, ke tio estas giganta frukto de la Granda Proleta Kultura Revolucio.

Poste la partia komitato de la gubernio okazigis siajn tri plivastigitajn kunvenojn en kiuj partoprenis ankaŭ sekretarioj de partiaj komitatoj de la komunumoj. La kunvenoj celis koni la situacion de klasbatalo kaj la karakteron de la ekzistanta linia batalo. En la kunvenoj kamarado Ĉeng Jongguj kaj la aliaj gvidantoj petis ĉiujn ĉeestantojn serioze pripensi la demandojn kiujn ili kolektis ĉe la komunumanoj. Kamarado Ĉeng Jongguj proponis, ke ĉiuj kunvenantoj iru inter la amasojn kaj en praktikajn batalojn por koni, kiu linio kaj kiu metodo povas solidigi kaj disvolvi la socialisman kolektivitan ekonomion kaj utilas al la komunumanoj; kiu linio kaj kiu metodo

ne. Li petis ilin gravuri en la koro la instruon de Prezidanto Maŭ, ke nur praktiko estas la unika kriterio por detekti veron.

Dum la kunveno la gvidantoj de la partia komitato de la gubernio kaj la sekretarioj de la komunumoj denove vizitis Daĝaj-brigadon. Ili vidis, ke la kadroj kaj komunumanoj de Daĝaj firme kontraŭstaris la deviojn, senŝanceliĝe persistis en la socialisma direkto kaj faris kion ili devis fari. Poste ili denove studis la faron de Daĝaj en 1963. En tiu jaro Daĝaj estis trafita de pereiga diluvo. Sed la brigado kondukis klasbatalon, persistis en socialisma direkto, firme kredis la grandan superecon de la socialisma kolektiva ekonomio, disvolvis la revolucian spiriton de sinapogo sur la propraj fortoj kaj penema luktado kontraŭ malfaciloj, fine garantiis la vivon de la komunumanoj, petinte de la ŝtato nek helpmonon, nek grenon, nek materialojn, kaj eĉ liveris al la ŝtato sufiĉan kontingenton da greno kaj turnis la malnovan Daĝaj en novan. Krome ili rememoris la faron de la tiama partia komitato de la gubernio. En la tri malfacilaj jaroj ĉirkaŭ 1961, la komi-

tato ne bremsis la kapitalisman deflankiĝon instigitan de Liu Ŝaŭki, plenumis eraran linion, kio kaŭzis damaĝon al la tuta popolo de la gubernio. Ili resumis la sperton en praktikado de Hijang en la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj konis ke la radika kialo de la grandaj atingoj en la lastaj jaroj kuŝas en senŝanceliĝa plenumo de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

PERSISTI EN ĜUSTA LINIO SIGNIFAS VENKON

Sub la firma gvido de la partia komitato de la gubernio, la popolo de Hijang profunde kaj vaste kondukis la movadon de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj reĝustigo de laborstilo kaj faris revolucionan kritikadon kontraŭ la kontraŭrevolucia reviziisma linio de Liu Ŝaŭki kaj Lin Biaŭ.


En la revolucia kritikado la komunumanoj de Bejgiedu-brigado de Giedu-komunumo komparis la katastrofon de 1972 kun tiu de 1920. En 1920 la sekeco daŭris nur 4 monatojn, sed en la vilaĝo Bejgiedu 56 familioj pereis pro malsato, 120 homoj migris aliloken, 90 homoj vendis siajn infanojn kaj multaj fariĝis almozuloj. Sed en 1972, la brigado akiris bonan rikolton kaj faris kontribuon al la ŝtato, kaj ĉies vivokondiĉoj estis garantiitaj. Cetere la brigado multe progresis en akvoreguliga konstruado. La komunumanoj diris, ke la du tute malsamaj rezultoj dependis de la du tute malsamaj socisistemoj.

En la revolucia kritikado la brigado Hiaŭdong-ju de Vakiu-komunumo komparis la du katastrofojn en 1961 kaj 1972 kaj la du malsamajn konsekvencojn kaŭzitajn de la du malsamaj linioj. La katastrofo de 1961 estis multe malpli grava ol tiu de 1972, sed pro la ĝenado de la reviziisma linio de Liu Ŝaŭki, la kolektiva ekonomio estis grave damaĝita kaj la grena produktokvanto reduktiĝis je pli ol duono. Dume la sekeco de 1972 postsekvis la hajlan katastrofon en 1971, sed dank' al la ĝusta

linio kaj socialisma direkto, homoj rikoltis sufiĉan grenon kaj brutoj havis sufiĉan furaĝon. La komunumanoj diris: “Jen estas la diferenco inter la du malsamaj linioj: unu alportis mizeron kaj la alia — feliĉon.”

En la revolucia kritikado ĉiuj brigadoj de Hijang komparis la katastrofon de sia brigado okazintan antaŭ la Granda Proleta Kultura Revolucio kun tiu de Daĝaj, kaj trovis la kialon de la sukcesoj atingitaj en la Granda Proleta Kultura Revolucio. En 1963, katastrofo same trafis Hiaŭvakiu-brigadon de Vakiu-komunumo kaj Daĝaj-brigadon. Daĝaj gajnis la batalon kontraŭ la katastrofo persiste irante laŭ la socialisma

La popolanoj de Hijang-gubernio faras akvoreguligan konstruadon.



direkto, dum Hiaŭvakiu, influita de la erara linio kaj ne persistanta en la socialisma direkto, tute sin apogis sur la ŝtato petante monon, pli ol 40 tunojn da greno kaj multajn objektojn, pro kio la kolektiva ekonomio ne povis esti disvolvita kaj stagnis plurajn jarojn post la katastrofo. En la Granda Proleta Kultura Revolucio, la brigado sufiĉe atentis pri la klasbatalo, kritikis la reviziisman linion kaj la ŝtato multe ŝanĝiĝis. En la pasinteco la plej alta produktokvanto de greno estis nur iom pli ol 250 tunoj, sed en 1971 pli ol 500 tunoj. Dank' al la disvolviĝo de la kolektiva ekonomio, la brigado aĉetis pli ol 20 agrikulturajn maŝinojn kaj pli ol 50 tirbrutojn.


De vintro de 1972 ĝis printempo de 1973 la tuta Hijang malkaŝis la damaĝon kaŭzitan de reviziisma linio kaj la krimon de kapitalismo kaj kritikis la kontraŭrevolucionan reviziisman linion de Liu Ŝaŭki kaj Lin Biaŭ. Tio estis forta orienta vento kiu baldaŭ repuŝis la herezan venton nur en kelkaj monatoj. La plenmano da klasaj malamikoj, kiuj origine vane intencis kapti la regopontencon kaj returni la gubernion sur kapitalisman vojon je la okazo de sekeco, nun tamen estis faligitaj de la vastaj amasoj.

Amasa kritikado kontraŭ Lin Biaŭ akcelis la amasan batalon kontraŭ la sekeco. En la gubernio centoj da akvoreguligaj konstruoj komenciĝis. Sandu-komunumo sola planis fosi Sandukanalon je 11,000 metroj longan. La gubernio komencis la batalon por krei 100,000 muojn (15 muoj = 1 hektaro) da irigaciataj kampoj. La kvina kvinjara plano (1976—1980) de la gubernio estis ellaborita. Ne havis plu bazon la opinio daŭrinta kelkajn

jarcentojn, ke en Hijang ne eblas fari akvoreguligajn aranĝojn.

Ĝusta linio garantias venkon. En 1973 Hijang akiris senprecedence bonan rikolton de greno. La areo de irigaciataj kampoj de la tuta gubernio grandiĝis de 18,000 muoj en 1971 ĝis 69,000 muoj. La plej grava rikolto estas, ke la batalo hardis la kadrojn kaj amasojn. Retrorigardante la paŝitan vojon en la pasintaj du jaroj, la kadroj kaj la komunumanoj de Hijang havis saman profundan komprenon: Persisti en revolucio kaj progreso signifas venkon.

La popolanoj de Hijang-gubernio gajnis altan produkton en la plagita jaro.



Vang Gjunŝaŭ—eminenta batalanto de laborista klaso



Vang Gjunŝaŭ

DANK' al la hardado per la Granda Proleta Kultura Revolucio, aperis grandanombre eminentaj personoj sur la diversaj frontoj de la socialisma konstruado en nia lando. Unu el tiuj estas komunisto Vang Gjunŝaŭ, ŝoforo de Gongĉangling-ferminejo de la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio. Por plenumi la instrukcion de Prezidanto Maŭ “**ekspluati mineralajn fontojn**”, Vang Gjunŝaŭ, sentime trarompante diversajn obstaklojn, iniciatis socialisman kunlaboron inter reciproke koncernantaj laborspecoj, kun rezulto multe kreskigi transportitan kvanton de erco. Pro tio Vang Gjunŝaŭ fariĝis elstara ekzemplo imitinda por la laboristoj de la tuta minejo.

I

Gongĉangling-ferminejo estas unu el la gravaj ercobazoj de la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio. La aŭtobrigado, en kiu laboras Vang Gjunŝaŭ, respondecas pri la transportado de fera erco en la minejo, tial ĝi estas ĉefa forto en transportado kaj ĝia laboro rekte influas la produktadon de la ferŝtala kompanio.

Iun el la lastaj tagoj de aŭgusto, 1972, Ĝang Ŝouling, sekretario de la partia komitato de la minejo kaj kelkaj aliaj gvidantoj venis por observi la fosejon kaj kolekti opiniojn de la laboristoj kaj tie renkontis Vang Gjunŝaŭ kaj kelkajn aliajn laboristojn. Li diris al Vang Gjunŝaŭ, ke la kritikado

kontraŭ Lin Biaŭ kaj reĝustigo de laborstilo forte akcelas vigan disvolviĝon de la socialisma konstruado de la lando. Por kontentigi la bezonon de la disvolvo de fera kaj ŝtala industrio, la partia komitato de la minejo decidis levi novan tajdon de produktado. Kaj li demandis, ĉu ili havas ion por diri kaj proponi.

Vang Gjunŝaŭ diris: “En la lastaj tagoj ni ofte pensis pri la demando: Kiel daŭre altigi la produktokvanton? La bormaŝinoj, ŝovelmaŝinoj kaj kamionoj de la fosejo apartenas respektive al tri apartaj sekcioj kaj la laboroj estas ne sufiĉe harmonie kunordigitaj. Se ni kunigus la tri sekciojn por disvolvi kunlaboron, la produktokvanto certe kreskos.”

“Bona ideo!” Laŭdis Ĝang Ŝouliang, kaj demandis, “Kiom da tunoj povos esti liveritaj en septembro laŭ via konjekto?”

Vang Gjunŝaŭ respondis: “Ni unuapaŝe kalkulis, ke en septembro ni povos transporti 250,000 tunojn da ŝtono, se ni kunigos unu bormaŝinon, unu ŝovelmaŝinon kaj kvin kamionojn en unu laborunuon.”

“Vere admirinda cifero! Tio estos kelkobligo de la laborefiko en la pasinteco.” Ĝang Ŝouliang firme premis al Vang la manojn kaj diris: “Via propono estas tre bona, efika metodo por multe, rapide, bone kaj ekonomie ekspluati mineralajn

fontojn, konforma al la ĝenerala linio de la Partio en la socialisma konstruado. Morgaŭ ni interkonsiliĝos pri tio en kunsido de la partia komitato.”

La partia komitato de la minejo rapide akceptis la proponon de Vang Gjunŝaŭ kaj decidis: tuj efektiviĝi ĝin en Vanggiahouŝan-fosejo.

Sed disputo leviĝis, kiam la aŭtobrigado informiĝis pri la rezolucio alprenita de la partia komitato.

La brigadestro diris al la ŝoforoj: “Iu el niaj brigadanoj proponis kunordigon de laboroj, ke unu bormaŝino, unu ŝovelmaŝino kaj 5 kamionoj jam sufiĉos por ekipi unu laborunuon al kiu eblis transporti en septembro 250,000 tunojn. Ni vidos, kion li faros, se ne plenumiĝos la promeso!”

Je la diro alvenis Vang Gjunŝaŭ. Li rekte ĵetis demandon al la brigadestro: “En kio estas malbono, se ni laboristoj faros pli grandan klopodon por disvolvi la ŝtalan industrion?” Li ekpikis al la laboristoj pri la ebleco de transportado de 250,000 tunoj da erco sub kondiĉoj de kunordigita laborado. Ĉiuj trovis lin prava kaj kritikis la brigadestron pri lia verŝo de malvarma akvo sur aktivecon de laboristoj. Multaj ŝoforoj ĉirkaŭis Vang Gjunŝaŭ kaj esprimis sian subtenon al li.

Informiĝinte pri la afero sekretario Ĝang Ŝouliang iris al Vang Gjunŝaŭ kaj diris: “Gjunŝaŭ, staru firme! Ne estas strange ke ia nova afero renkontas ofte oponon ĉe iuj personoj. Tio estas batalo inter nova kaj malnova pensoj kaj inter ĝusta kaj erara linioj. La partia komitato firme subtenas vin.”

II

Dank’ al la subteno de la partia komitato kaj la amasoj, fondiĝis en Vanggiahouŝan-fosejo speciala labortaĉmento kun Vang Gjunŝaŭ kiel estro. Antaŭ komenco de la laboro de la taĉmento Vang diris al siaj kolegoj: “Ni laboristoj devas plenumi kion ni promesis. Ni nepre plenumu plene en unu monato la taskon de transporto de 250,000 tunoj.” Ankaŭ la ĉefbormaŝinisto Vang Jujong kaj ĉefŝovelmaŝinisto Du Hingfa esprimis, ke ili nepre garantios la glatan plenumon de la tasko. En tiu tago la taĉmento transportis unuspire pli ol 500 kamionojn da erco, kun superplenumo de pli ol 100.

En pli profunda disvolvo de la movado por kritiki Lin Biaŭ kaj reĝustigi laborstilon, la laboristoj de la taĉmento faris komparon inter la nova kaj malnova socioj, kritikis la krimojn de Lin Biaŭ



Vang Gjunŝaŭ (la unua de maldekstre) kune kun aliaj esploras funkciadon de ekipaĵo por garantii glatan iradon de la produktado.

kaj liaj sekvantoj, kiuj intencis ŝanĝi la bazan linion de la Partio kaj restaŭri kapitalismon. En la kritika kunveno Vang Gjunŝaŭ rememoris sian mizeran vivon en la malnova socio kaj prikantis la hodiaŭan feliĉan vivon.

Vang Gjunŝaŭ devenis de malriĉkamparana familio kaj pasigis 14 suferplenajn jarojn en la malnova socio. En 1948 lia hejmvilaĝo estis liberigita kaj lia familio ricevis agron kaj domon. La Partio sendis lin al la industria fronto kaj kulturis lin en ŝoforon. Li amas la Partion, Prezidanton Maŭ kaj socialismon kaj senkompare indignas pri la damnindaj krimoj de Lin Biaŭ. Li diris: “Lin Biaŭ intencis repuŝi nin en la malnovan socion, tio estas absolute nepermesebla. Lin Biaŭ intencis restaŭri kapitalismon, do ni devas senŝanceliĝe persisti sur la socialisma vojo.”

La revolucia kritikado plue vekis en la laboristoj socialisman aktivecon. La transportita kvanto de unu skipo de la taĉmento de Vang Gjunŝaŭ kreskis de 500 ĝis 600 kamionoj da erco. Iutage la tria skipo de la taĉmento eĉ kreis la rekordon de 802 kamionoj da erco.

Ĝuste en tiu tempo la supre menciita brigadestro kalkuladis per abako en sia oficejo. Li neniel povis elkalkuli, ke en unu skipo eblas transporti

802 kamionojn da erco. Li dubis, ĉu la rekordo estas vera. Aŭdinte tion la laboristoj tre indigniĝis. Ili diris, ke la entuziasmo de laboristoj estas nealkalkulebla por dekstremaj konservativuloj.

Vang Gjunŝaŭ pensis en si: “Ni laboristoj volas multe, rapide, bone kaj ekonomie eksploati la mineralajn fontojn, sed iuj personoj volas iri malrapideme, kulpigante aliajn pri troa rapideco.” Li interkonsiliĝis kun la kolegoj kaj decidis fari demonstradon ĉe la fosejo por eduki per fakto la konservativulojn. La propono ricevis subtenon de la partia komitato.

En la tago de demonstrado ekspedistoj de la minejo kaj aŭtobrigado venis por nombri. Ankaŭ la brigadestro estis invitita por funkcii kiel “surloka direktanto”.

Vang Gjunŝaŭ faris unue mobilizan parolon: “Kamaradoj, ĉu ni hodiaŭ transportos ercon multe aŭ malmulte, tio estas ne bagatela afero, sed koncernas gravan problemon kian linion ni plenumas. Ni montru la indecon de la laborista klaso kaj la revolucia linio de Prezidanto Maŭ.” En tiu tago la fosejon regis alta vigleco. La laboristoj de bormaŝino kaj ŝovelmaŝino kaj ŝoforoj ĉiuj penis fari sian plejblon en plena akordo, klopodante

krei favorajn laborkondiĉojn unuj por aliaj. Unu horon antaŭ la fino de la skipo la nombrantoj ekkriis: “Kamaradoj, vi venkis, atinginte jam 1,216 kamionojn!” El la plenumita fakto la brigadestro ekkonis sian eraron.

Kun tia spirito la taĉmento de Vang Gjunŝaŭ transportis en septembro 269,000 tunojn da erco superinte la taskon kiun ili prenis sur sin, elhakinte por la minejo novan vojon de multa, rapida, bona kaj ekonomia eksploatado.

III

Tamen Vang Gjunŝaŭ ne haltis en sia antaŭenmarŝo.

En la komenco de 1973 Vang Gjunŝaŭ ĉeestis la kunvenon de reprezentantoj de avangardaj kolektivoj kaj personoj de Anŝan. En tiu kunveno li aŭdis el la parolado de gvidanto de supera instanco, ke malgraŭ la kreskado de nia produkta kvanto de ŝtalo kaj fero, ĝi ankoraŭ ne povas kontentigi la bezonojn de la socialisma konstruado de nia lando. Vang sentis ŝtonon sur sia brusto. Li rememoris la instruon de Prezidanto Maŭ: “**La greno kaj ŝtalo: havante tiujn du objektojn en sufiĉa**

Antaŭ ekveturo



kvanto ni povos facile solvi ĉion alian.” Kaj en li komencis fermenti nova plano.

Post la kunveno li interkonsiliĝis kun Vang Jujong, Du Hingfa kaj aliaj kolegoj. Vang Gjunŝaŭ diris: “Kvankam en la pasinta jaro ni ion atingis, ĉu ĉijare ni ne povus ankoraŭ plialtigi la starigitan normon?” Vang Jujong kaj Du Hingfa diris ĝoje: “Jen ni renkontiĝas en la sama penso.” Ekdisvolviĝis diskutado: Se ĉiumonate en la kuranta jaro oni transportos 250,000 tunojn da erco kiel en septembro pasintjare, la jara kvanto atingos 3,000,000 tunojn. Eĉ se ni rezervos por ni marĝenon kaj taskos nin per 2,500,000 tunoj, jam tio superos la jarplanon de la minejo je 1,000,000 tunoj.

Kiam la informo de tiu ideo trakuris la minejon, iuj denove ekverŝis malvarman akvon: “Vang Gjunŝaŭ certe perdis sian kapon pro la ekstazo de akirita venko. Oni povas elteni streĉecon por unu monato, sed por tuta jaro estas alia afero. Jara tasko de 2,500,000 tunoj estas maleblaĵo.”

Spite al tiuj babiladoj, Vang Gjunŝaŭ kaj liaj kolegoj daŭre strebadis al la nova celo kun la subteno de la partia komitato kaj la vastaj amasoj.

Kompreneble malfaciloj estis multaj. Iun junian tagon, ŝtormo atakis Gongĉangling-ferminejon. Elektrofadenaj fostoj estis faligitaj kaj brakodikaj arbobranĉoj estis rompitaĵoj. Tuj en la komenco de la skipo kamaradoj demandis: “Majstro Vang, kiel ni hodiaŭ faros?” Vang Gjunŝaŭ diris: “Ĉu nia taĉmento ne havas la spiriton kuraĝe batali kontraŭ reviziisma linio, kontraŭ eraraj pensoj kaj kontraŭ la naturo! Hodiaŭ ni ja batalos kontraŭ la naturo. Kiel ajn furioza estos la ŝtormo, la

taskon ni nepre plenumos. Ni vidos, kiu venkos kiun!” “Jes!” Ĉiuj ĥore respondis lin.

La pluvego tiel furiozis ke la glacoviŝilo eĉ ne povis klarigi la kamionan glacon. La ŝoforoj mallevis la vitron por vidi pli klare kaj post nelonge ili estis tute tramalsekigitaj. Ankaŭ manipulisto de ŝovelmaŝino devis fari tion kun sama rezulto, ĉar li zorgis por ne difekti la kamionojn pro malbona vidado dum manipulado. Kiuj vidis la laboradon de tiuj kamaradoj, ĉiuj emocie diris: “Ni neniam vidis tiel entuziasman laboradon en tia veteraĉo!”

En la ardaĵ laboroj kaj bataloj Vang Gjunŝaŭ diligente studas Marksismen-Leninismen kaj verkojn de Prezidanto Maŭ, senĉese levante sian politikan konscion, serioze plenumante la revolucian linion de Prezidanto Maŭ kaj poste glorie aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio. En la pasinta jaro, sub la kuraĝigo de la Deko Tutlanda Kongreso de la Partio, Vang Gjunŝaŭ kaj liaj kolegoj superplenumis la taskon de 2,500,000 tunoj 8 tagojn antaŭdate pliligante 300,000 tunojn.

Sub la konduko de Vang Gjunŝaŭ, 8 laboristoj el lia taĉmento fariĝis avangarduloj de la minejo kaj 13 laboristoj el la aŭtobrigado nun atingis aŭ superis la labornormon de Vang Gjunŝaŭ. Nun la socialisma kunlaboro jam disvolviĝis en socialisman konkurson en la tuta minejo. Fajre leviĝis en la tuta minejo la kampanjo “Imiti kaj superi Vang Gjunŝaŭ”.

Antaŭ nelonge Vang Gjunŝaŭ estis promociita al vicsekretario de la partia komitato de la minejo. Por la afero de la Partio nun li portas sur si pli gravan taskon.



Kurantaj Aferoj



ALIA GRANDA ELEKTRA PUMPSTACIO

La alia granda elektra pumpstacio de Giangsu-provinco — la unua pumpstacio de la Huaj-an-a akvoreguliga ŝlosila konstruaĵo, estas venke konstruita kaj funkciigata.

La pumpstacio kun ok pumpmaŝinoj estas unu el la kvin grandaj elektraj pumpstacioj de Giangsu-provinco konstruitaj

post la jaro 1961. Ĝi povas pumpi pli ol 60 kubmetrojn da akvo po sekundo, levi je 4.5 metroj alten la akvon transigitan de Giangdu-pumpstacio el Jangzi-rivero en la Grandan Kanalon kaj poste sendi la akvon norden tra la Ĝenerala Irigacia Kanalo de Norda Giangsu, por irigacii kampojn de la regionoj Huajjin kaj Hjuĝoŭ. Kaj dum drema sezono, ĝi povas ankaŭ transigi la inundan akvon el la 46,700 hektaroj da kampoj okcidente de la Granda Kanalo kaj sude de la nomita ĝenerala kanalo kaj poste dreni ĝin orienten en maron tra la nomita ĝenerala kanalo, tio multe altigis la tiean drenpovon.

Tri maljunaj ekspartizanoj

BAJJANGDIAN estas granda dolĉakva lago en la norda parto de Ĉinio. Dum la Kontraŭ-japana Rezistmilito kaj Liberiga Milito la popolanoj ĉe Bajjangdian, sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio, sin organizis en surakvan geriltrupon kaj faris gerilan militon en la postfronto de la malamikoj. La surakva geril-trupo ankaŭ nomis sin Janling-trupo (“Janling” ĉinlingve signifas sovaĝanseran plumon kaj la geril-trupo prenis ĝin kiel sian emblemon). Bajjangdian havas la areon de 366 kvadrataj kilometroj kaj konsistas el 96 lagoj kaj pli ol 3,000 kanaloj. En somero ĝi estas plenkovrata de densaj fragmitoj. Utiligante la favoran terformon de tiuj lagoj, kanaloj kaj densajn fragmitojn, la gerila trupo ofte donis pezan baton al la malamikoj. Pro tio Bajjangdian fariĝis fama kontraŭjapana revolucia bazloko en la centro de la Hebej-a ebenaĵo. Ĉe la lago estas Ĝajnavilaĝo kie vivas tri maljunaj ekspartizanoj. Ili ĉiam konservas la gloran revolucian tradicion kaj diligente laboras por la revolucio. En la vilaĝo cirkulas multaj kortuŝaj rakontoj pri ili.

KUNBATALANTOJ EN LA SAMA TRANĈEO

Antaŭ pli ol 40 jaroj Liu Hajven, Ĝang Gian-an kaj Meng Hiaŭfu ĉiuj estis infanoj de malriĉuloj kaj loĝis en sama vilaĝo. Ĉiu el ili havis suferplenan travivaĵon antaŭ ol ili aliĝis al la geril-trupo. Ekzemple, en sia dekjara aĝo Liu Hajven jam elmigris por almozpeti kune kun sia onklo kaj estis ĉiam sub turmentado de malsato kaj frosto. En 1938 komunistoj venis al Bajjangdian kaj mobilizis la popolanojn al batalo kontraŭ japanaj agresantoj. La onklo de Liu Hajven aliĝis al la Okavoja Armeo gvidata de la Komunista Partio de Ĉinio.

En iu vintra tago de 1940 13-jara Liu Hajven iris almozpeti kaj renkontis survoje japanajn di-

ablojn. La lastaj ŝnurligis lin al arbo kaj forte batis lin ĝis duonmorto, tenis lin je la kruroj kaj minacis enpuŝi lin en puton, kun la intenco devigi lin konfesi, ke li estis el la Okavoja Armeo. En tiu danĝera momento vilaĝanoj alrapidis kaj garantiis al la japanaj agresantoj ke la knabo estas almozuleto kaj havas nenian rilaton kun la Okavoja Armeo. Nur tiel Liu Hajven saviĝis el sub la ungegoj de la diabloj. Li plenis je la klasa kaj nacia malamo, serĉadis kaj trovis kompartian organizon, aliĝis al la surakva geril-trupo kiel ĝia plej juna membro. Post nelonge ankaŭ Ĝang Gian-an kaj Meng Hiaŭfu fariĝis membroj de la trupo. De tiam, sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio, ili luktis kontraŭ la japanaj agresantoj kune kun aliaj kamaradoj de la trupo, mortigis naciperfidulojn kaj detruadis fortikaĵojn de la malamikoj. Ili ne havis fiksan loĝejon, nek akuratan manĝadon kaj vivis malfacilan batalan vivon.

En la Aŭtunmeza Festo de 1943 la supera partia organizo informiĝis, ke pluraj malamikaj ŝipoj plenŝarĝitaj veturos al iu urbego, kaj ordonis la surakvan geril-trupon embuski. Liu Hajven, Ĝang Gian-an kaj Meng Hiaŭfu venis kun sia trupo en la pozicion. Liu Hajven estis en sturma grupo, Meng Hiaŭfu en la unua subplotono, Ĝang Gian-an sekvis politikan direktoron. Ili kaŝis sin en densaj fragmitoj en ĝistalia akvo kaj atendis ordonon de ekpafo. Kiam la malamika ŝiparo veturis en la embuskejon, la estro de la trupo faligis per unu pafo la gvatiston sur malamika ŝipo, kaj ĉiuj pafiloj eksonis en fragmitejoj. “La sturma grupo sekvu min!” laŭte kriis la estro. Liu Hajven kaj liaj kunbatalantoj elkuris el la fragmitejo kaj rapide surgrimpis la pruan de malamika ŝipo. Je tiu momento grenado falis sur la pruan kaj estis tuj eksplodonta. Ĉe la ekvido Liu Hajven rapide formovis ĝin per fusilo kaj tiu grenado eksplodis

en akvo. Neniu el niaj soldatoj vundiĝis. La subplotonono de Meng Hiaŭfu estis barita de la intensa pafado de la malamikoj kaj la subplotonestro Di Ĝike kaj soldato Li Kemu sinsekve oferis sian vivon. Preskaŭ samtempe kun tio Ĝang Gian-an kaj kelkaj soldatoj sturmis alian malamikan ŝipon kaj ĵetis grenadojn en la holdon de la malamikoj kaj la lastaj konsterniĝis. “Sturmu kaj venĝu la subplotonestron!” Meng Hiaŭfu kun kriego sin ĵetis en atakon. Tondris venĝ-krioj. Post batalo de pli ol unu horo ĉiuj malamikoj estis ekstermitaj, kaj granda kvanto de iliaj militaj materialoj estis predita. Tio estas la fama embuska batalo farita de la surakva geril-trupo en fragmitejoj.

Liu Hajven, Ĝang Gian-an kaj Meng Hiaŭfu estis multe harditaj en bataloj kaj glore fariĝis membroj de la Komunista Partio de Ĉinio. Poste ili partoprenis en la granda Popola Liberiga Milito kaj batalis en la sama kompanio kontraŭ la kuomintangaj reakciuloj.

GVIDISTOJ EN IRO DE SOCIALISMA VOJO

Meng Hiaŭfu kaj Ĝang Gian-an kripliĝis pro vundiĝo en batalo kontraŭ la malamikoj kaj Liu Hajven ekhavis kronikan malsanon pro troa laciĝo, tial ili ne povis plu servi en la armeo. En junio

de 1947 ili demobiliziĝis el la armeo kaj kune revenis al Ĝajnan-vilaĝo kun granda espero de la gvidantoj de la trupoj kaj komencis novan batalvivon.

Vintre de la sama jaro komenciĝis en Ĝajnan-vilaĝo la granda kampanjo de agrara reformo. Meng Hiaŭfu estis elektita kiel estro de la malriĉ-kampanjana ligo, Ĝang Gian-an kaj Liu Hajven respondecis pri sekurigo. Ili estis tre dankemaj al la Partio kaj la amasoj pro la konfido kaj decidis bone plenumi la taskon de agrara reformo kune kun la vilaĝanoj sub sia gvido, por konstrui solidan revolucion bazlokon kaj disvolvi la produkton por subteni la fronton. Kune kun malriĉaj fiŝistoj ili faris batalon kontraŭ bienuloj kaj fiŝtiranoj kaj dividis iliajn agroj. La agrara reformo disvolviĝis arde en Ĝajnan-vilaĝo.

Post agrara reformo la malriĉaj fiŝistoj akiris teron kaj instrumentojn por fiŝkapta uzo kaj ilia vivo pliboniĝis tagon post tago. Sed iuj el la fiŝistoj ne povis ne forvendi la ĵus akiritan teron pro manko de laborfortoj aŭ pro okaza inundo aŭ malsano; dum iuj kulakoj kaj riĉaj mezkampanoj denove komencis ekspluati aliajn per dungado. Ĝis la jaro 1952, 18 familioj en la vilaĝo forvendis sian teron. La partifilio de Ĝajnan-vilaĝo



La veterano de Janling-trupo rakontas al junulinoj pri la revolucia batalo en la partifilio.

Ĝang Gian-an, vicsekretario de la partia filio, iras al kamplaboro kune kun komunumanoj.



serioze analizis la situacion kaj opiniis ke nur konduki la kamparanojn sur la vojon de kooperigo povos haltigi la polariziĝon al la du ekstremoj de malriĉeco kaj riĉeco. En printempo de 1953 fondiĝis en la vilaĝo la unua elementa agrikultura kooperativo sub la gvido de Meng Hiaŭfu kaj Ĝang Gian-an, kiuj tiam respondecis pri gvida laboro de la partifilio. Sekve Kvinstela Kooperativo stariĝis sub iniciato de Liu Hajven kaj maljuna malriĉkamparano Ĝang Joŭtang. La malnovaj batalamikoj, kiuj kune ekstermadis malamikojn, nun fariĝis pioniroj en la kooperiga movado en Ĝajnan-vilaĝo.

Por organizi la kamparanojn en kooperativon la tri maljunaj kamaradoj vizitis kamparanajn familiojn unun post alia kaj faris profundan kaj detalan ideologian laboron. Fiŝisto Liu Aŭ timis domaĝon pro aliĝo al la kooperativo kun sia nove aĉetita ŝipo. Ili venis al Liu Aŭ kaj kune kun li rememoris la suferojn en la malnova socio por altigi lian klasan konscion. Liu Hajven diris al li sincere: “En la malnova Ĉinio ni malriĉuloj havis nek domon nek teron kaj ĉiam suferis malsaton kaj malvarmon. Estas la Komunista Partio de Ĉinio kaj la Okavoja Armeo, kiuj savis nin kaj faris nin mastroj de la ŝtato. Hodiaŭ ni starigas kooperativon ĝuste por ke ni ne vivu plu almozulan vivon!” Ĉe ektuŝo de la migranta almozula vivo Liu Aŭ tuj ekmemoris la doloran pasintaĵon. Tio okazis en vintro. Iutage ventego furioze blovis kunportante neĝflokojn. Liu Aŭ fuĝis en templo kun sia edzino kaj sesjara filino. Tiam malsato

kaj malvarmo akre turmentadis ilin ĉiujn. Liu Aŭ diris al sia edzino kun larmoj: “Vi kaj la infano foriru de tie ĉi por iel vivaĉi plu, por ke ni ne ĉiuj malsatmortu!” De tiam ili disiĝis kaj revidiĝis nur post la Liberiĝo. Post la rememoro Liu Aŭ esprimis, ke ekde nun li ĉiam sekvos la Partion.

Ĝuste en la alta tajdo de kooperigo venis al la vilaĝo la nigra vento levita de Liu Ŝaŭki por grandnombre malorganizi la kooperativojn, kaj la klasaj malamikoj ekĝojegis. “La kooperativo ne daŭros longe pro multeco de membroj kaj malkonkordo,” diris iu aĉulo kun la intenco agiti la kooperativanojn elkooperativiĝi. Vizaĝe al la kalumnioj kaj blasfemoj fare de la malamikoj, la tri maljunaj gerilanoj tuj donis antaŭ la publiko fortan baton al iliaj absurdaĵoj per supereco de la kooperativoj montrita depost ilia fondiĝo. La kooperativoj en Ĝajnan-vilaĝo ne nur ne falis, sed pli grandiĝis pro aliĝo de novaj familioj dank’ al ilia persvada laboro. En 1958, sub ilia gvido la popolamasoj starigis popolan komunumon.

En la 27 jaroj post sia demobiliziĝo la tri malnovaj partizanoj firme memoras la instruon de Prezidanto Maŭ “**disvolvi la revolucionan tradicion por akiri pli grandan gloron**”, gvidis la vilaĝanojn en firma irado de socialisma vojo, aktive partoprenis en kolektiva produkta laboro kiel ordinara laborulo kaj pene laboras kune kun la amasoj por konstrui novan socialisman kamparon.


Okcidente de Ĝajnan-vilaĝo troviĝis granda salalkala terpeco de cent hektaroj kaj estis ankoraŭ

ne bone reformita. En la Granda Proleta Kultura Revolucio la partifilio decidis mobilizi la amasojn por reformi ĝin en kampojn stabile alt-produktajn. Post komenco de la reforma laboro ili venis al la terpeco kaj batalis kune kun la popolamasoj.

Meng Hiaŭfu estis la plej aĝa el la pli ol 300 kanalfosantoj. Tamen li tute ne agnoskis sian maljunecon kaj laboregis same kiel junuloj. Ĉe vesperiĝo li revenis de la laboro kaj tiel forte laciĝis ke doloris al li la brakoj kaj la traĥeito denove atakis lin. Malgraŭ tio li ankoraŭ daŭrigis sian laboron en la sekvanta tago. La junuloj zorgeme diris: "Onklo, vi tro laciĝis!" Li tamen respondis: "Mi devas multe labori por ke ni produktu pli da greno por subteni socialisman konstruadon de la lando."

En majo la tri malnovaj partizanoj partoprenis en plantado de rizplantidoj. En la lastaj jaroj Ĝang Gian-an eksuferis de osta elkreskaĵo je talio. Malgraŭ tio Ĝang Gian-an partoprenis en la laboro, pensante ke li estas vicsekretario de la partia filio kaj devas doni bonan ekzemplon al la aliaj. Li laboris kliniĝinte kaj sentis akran doloron je la lumbaj vertebroj, kaj krome ankaŭ lia dekstra mano vundita en la militaj jaroj ne povis moviĝi libere. Sed kiam li ekmemoris la batalamikojn kiuj oferis sian vivon en la bataloj, li ekhavis nevideblan apogforton, kaj kun tiu forto li persistis en la plantado ĝis la fino.

Junaj milicianoj faras ekzercon de pafado kaj naĝado sur Bajjangdian.



LA REVOLUCIA TRADICIO TRANSDONIĜU DE GENERACIO AL GENERACIO

Eduki junulojn per la revolucia tradicio estas problemo ĉiam zorgata de la tri malnovaj partizanoj dum la lastaj multaj jaroj. Laŭ ilia opinio, la junuloj, kiuj kreskas en la nova socio, ne persone spertis la suferojn en la malnova socio kaj ne sciis ke la hodiaŭa feliĉa vivo estis gajnita per grandega penado, tial konstante eduki junulojn fariĝis devo nerifuzebla por la maljuna generacio.

La tri maljunaj kamaradoj ofte rakontis al la junuloj siajn suferplenajn travivaĵojn en la pasinteco kaj la kruelan ekspluatadon fare de bienuloj kaj fiŝtiranoj, precipe edukis ilin per la aktuala klasbatalo. Foje iu kulako en la vilaĝo diris al sia parenco: "Vi memoru, ke antaŭe la granda terpeco apartenis al nia familio, kaj estis dividita de malriĉuloj." Informiĝinte pri tio kamarado Ĝang Gian-an kunvokis la gejunulojn kaj kune kun ili faris kritikon kontraŭ la kulako kaj per tio altigis ilian konscion pri la klasa batalo. La junuloj diris: "La bienuloj kaj kulakoj ĉiam songas pri restaŭro, tial ni nepre devas esti singardemaj kaj ĉiam pretaj frakasi ilian intrigon."

La tri malnovaj partizanoj multe zorgis pri la milica laboro en Ĝajnan-vilaĝo. Ili ofte rakontis al la milica organizo la rolon luditan de milicianoj kaj iliajn heroaĵojn en militaj jaroj kaj partoprenis en milicaj aktivadoj. Foje la milica organizo de Ĝajnan-vilaĝo planis fari surakvan manovron kaj invitis la tri ekspartizanojn kiel iliajn konsilantojn. La manovro komenciĝis. La milicianoj sin kaŝis en fragmitejoj por atendi la alvenon de la "malamikon". Kiam la "malamika" ŝipo alproksimiĝis al la embuskejo, la konsilantoj rimarkis ke iuj milicianoj brue ŝercis kaj iuj ceteraj plendis pri varmeco kaj ne atentis pri bona kaŝiĝo. Tiam la tri maljunaj partizanoj alvokis ilin kaj diris serioze: "Ĉiu devas firme starigi pretecon por milito kaj esti ĉiam pretaj kontraŭ ĉia surpriza atako de imperiismo. Ŝvitado en ekzerco malmultigos sangadon en militado. Ĉiu el la milicianoj devas serioze trakti la hodiaŭan militekzercon kaj ne devas permesi al si agi libere." Dank' al ilia eduko la milit-ekzerco ricevis atenditan efikon.

Alian fojon Liu Hajven estis komisiita de la partia filio gvidi la milicianojn de la vilaĝo al Hidajjang por partopreni en konstruado de akvokonservejo. Survoje iuj milicianoj grumblis ke estiĝis vezikoj al iliaj plandoj, kaj aliaj plendis pri laciĝo. En paŭzo kamarado Liu Hajven kolektis ilin ĉirkaŭ si kaj rakontis al ili pri Vang Hiuĝi, la sanitaristino

de la kompanio de Liu Hajven en la Liberiga Milito. En la militaj jaroj la trupoj ĉiutage devis piediri pli ol 50 kilometrojn, sed Vang Hiuĝi neniam plendis pri laciĝo. En militejo ŝi ofte aperis ĉe plejfronto kaj klopodis savi vunditojn. Foje dum irado de batalo, malgraŭ vivdanĝero ŝi iris por fari bandaĝon al grave vundita soldato kaj poste ŝultroportis lin revene. Subite alflugis obuso, kaj vundis Vang Hiuĝi, tamen ŝi obstine plenumis portadon de la vundito. Aŭdinte la rakonton pri Vang Hiuĝi ĉiuj milicianoj estis kortuŝitaj kaj decidis lerni de ŝi kaj atingis la konstruejon nur per du tagoj.

En la konstruejo Liu Hajven laboris kiel estro de la junula sturma kompanio. Li estis komandanto kaj samtempe batalanto. En laboro li donis ekzemplon kaj dum ripozo li kore interparolis kun ili. En profunda nokto, kiam la konstruantoj jam profunde endormiĝis, Liu Hajven iris de ĉambro al ĉambro por ekzameni ĉu ĉiu estis bone kovrita en la litaĵo. En libera tempo li ofte rakontis al la

junuloj pri la malfacila vivo de la surakva geriltrupo. Tiam por kaŝi sin de la malamikoj, la membroj de la surakva geriltrupo devis vivi en fragmitejoj. Ili ofte pasigis tagon en pluvo aŭ sub flamaĵoj kaj nokte ili ne povis endormiĝi pro pikado de moskitoj. Malgraŭ tio ili ĉiutage persistis en lernado de politiko, milito kaj kulturo. Vintre, kiam la malamikoj faris balaadon, ili ne povis eniri vilaĝon kaj devis tranokti sur la glaciiginta lago. Kelkfoje ili estis sieĝitaj en fragmitejoj, kaj prenis manĝon nur unu fojon por du aŭ tri tagoj. En malvarmo kaj malsato neniu el ili havis plendojn. Tiu rakonto vekis ĉe la junuloj pasion de lernado de la revolucia tradicio. Dank' al la konstanta edukado fare de kamarado Liu Hajven per la revolucia tradicio la junula sturma kompanio ĉiam estis viveplena, venkis ĉian ajn grandan malfacilon kaj fariĝis avangardo en la konstruejo. Nun floras kaj fruktodonas ĉe la juna generacio la revolucia tradicio de la ĉina popolo.

Paŝtistino-kuracistino Rico

de VEJKING

EN la halo, kie okazis la Deka Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio, en aŭgusto de 1973, sidis juna tibetana reprezentantino. Kiam Prezidanto Maŭ aperis sur la podio, ŝi ekscitiĝis kun feliĉaj larmoj kaj forte huraadis. Ĉu ŝi povis ne ekscitiĝi, kiam ŝi, sklavino en la malnova socio, hodiaŭ tamen povis diskuti gravajn aferojn de la Partio kaj la ŝtato kune kun sia granda gvidanto Prezidanto Maŭ?

La reprezentantino veninta de la Juŝu-a Tibetana Aŭtonoma Subprovinco de Kinghaj-provinco nomiĝas Rico, kiu estas membro de la partia konstanta komitato de Kjumalaj-gubernio kaj de la partia filio de Cuoĉi-brigado de Kjumahe-komunumo. Kiel paŝtistino-kuracistino de la brigado, ŝi entuziasme servas al paŝtistoj. Ŝiaj laŭdindaj

faroj estas tiel multaj kiel pompe florantaj floroj sur montoj.

I

Cuoĉi-brigado sidas ĉe la suda piedo de Bajan-kara-montaro, de kie komenciĝas la fonto de Jangzrivero. En tiu loko meznombro 5,000 metrojn alta super la mara nivelo oni povas vidi tian maloftan veteron, ke eĉ en junio ekflirtas neĝflokaj. Kaj sur la tutjare paŝtebla stepo de la brigado, kun areo de 1,200 kvadrataj kilometroj, ondas montĉenoj kun multaj sovaĝaj bestoj. Ĝuste en tiu loko Rico faras sian kuracan servon al malriĉpaŝtistoj kaj malsuperaj mezpaŝtistoj dum multaj jaroj.

En la brigado oni ŝerce alinomas ŝin "anstataŭanto de malsanuloj", ĉar dum sia flegado de mal-



sanuloj ŝi helpas ilin ne nur en dommastrumado, sed ankaŭ ofte anstataŭe en la kolektiva produkta laboro. Ekzemple, somere ŝi tondas lanojn anstataŭ malsanuloj, kaj vintre faras noktan flegadon al la ĵus naskitaj ŝafidoj. Foje komunumanino Cemo malsaniĝis, Rico flegis ŝin en ŝia domo pli ol dek tagojn, kaj samtempe por ŝi melkis bovinon kaj plenumis la taskon asignitan de la produkta grupo por kirli kremon frumatene kaj vespere. Iuvintre, Ceĉoj, malriĉpaŝtistino de la unua produkta grupo, malsaniĝis kaj iris kun siaj du filinoj al la hejmo de Rico por peti kuracadon. La lasta do lasis ilin manĝi kaj loĝi en sia domo. Trovinte ke ŝiaj filinoj estas malmulte vestitaj, Rico kaŝe preparis por ili vestojn, kaj donacis ilin al la knabinoj kiam Ceĉoj volis reveni hejmen post sia resaniĝo. En septembro de 1967 oni estis tre okupataj pri grasigo kaj parigado de brutoj sur la stepo. Pro tio Rico frumatene eliris kun medikamenta kesto el la jurto por rondira kuracado sub neĝado. Vespere kiam ŝi lace revenis vadante en rivero kun glacio, ŝi falis sur glacipecon. Grimpinte sur la bordon ŝiaj gamboj estis jam neniel moveblaj. Ŝi do tie tranoktis kuntiriĝante sub la ĉielo. La sekvantan matenon, forskuinte neĝon de sur la vesto ŝi malfacile ekpaŝis. Tamen pro troa laciĝo ŝi ankoraŭfoje svene falis sur herbejon.

Apenaŭ ŝi elsveniĝis dank' al urĝa helpo de proksimaj paŝtistoj, ŝi jam volis viziti pacientojn.

Tiam la paŝtistoj admonis ŝin kortuŝite: “Nu, kion fari, se vi denove falus?” Rico diris ridetante: “Mia vivo estas donita de la Kompartio, do mi ne timas fali pro la servado al la popolo!” Tion dirinte ŝi forlasis la jurton.

En aprilo de 1972, Rico kaj ŝia filo estis malsanaj hejme. Matenon malriĉpaŝtisto Paldan kaj lia edzino kun sia malsana filo Ĉimedcering maltrankvile eniris en la jurton de Rico. Ilin vidinte, Rico tuj leviĝis kaj faris ekzamenon al ilia filo. La lasta suferis akutan pneŭmoniton kaj disenterion. Tre gravaj estis la malsanoj. Sed troviĝis ĉe ŝi malmulte da medikamento por tiuj malsanoj. Senhezite Rico prenis la injektaĵon, kiu estis uzota por ŝia filo, kaj injektis ĝin al Ĉimedcering. Vidinte ke ankaŭ Rico kaj ŝia filo estis en malsano, la geedzoj do foriris kun la filo. Tamen Rico pensis, ke la knabo suferis de tre grava malsano, tial ŝi ankoraŭfoje ellitiĝis kaj hastis al la jurto de Paldan portante la medikamentan keston post ĉirkaŭfermo de la litkovrilo por sia filo. Tre maltrankviliĝis Paldan kaj diris: “Ankaŭ vi kaj via filo estas malsanaj. Kial vi alvenis?” Rico diris: “Mi maltrankviliĝas de malsano de via filo.” Post sia flegado de unu tago en la hejmo de Paldan ŝi ankoraŭ ne volis foriri pro tio ke la knabo ankoraŭ ne evidente resaniĝis. Sed ankaŭ la geedzoj maltrankviliĝis pro la malsano de ŝia filo. Tial ili devigis ŝin reveni al ŝia hejmo.



Rico inter paŝtistoj

La sekvantan frumatenon aŭdiĝis la intima voĉo ekster la jurto de Paldan: “Kara onklo Paldan, kiel fartas via filo?” Estis tute neatendite, ke Rico alvenis tiel frue, ĉar la distanco inter iliaj hejmoj estas dekkvin kilometroj. Elirinte el la jurto kaj vidante prujnon sur ŝiaj brovoj kaj haroj, Paldan ekscitiĝis ĝis larmoj kaj forte manpremis kun ŝi dirante: “Kara Rico, ni neniam forgesos vin, nian ‘driĉenĉan’ (savanton)!” Rico ruĝiĝis de la laŭdo kaj diris: “Niaj savantoj estas la Kompartio kaj Prezidanto Maŭ. Sen ili ne estus mi mem!”

II


En 1945, Rico naskiĝis en malriĉpaŝtista familio de Daji-gubernio de Kinghaj-provinco. Kiam ŝi estis unu-jara, ŝia patrino mortis de malfacila akuŝado sen kuraco; kaj ŝia patro estis senkaŭze pafmortigita de brutoposedanto kiam ŝi estis kvin-jara. De tiam ŝi kaj ŝiaj tri gefratoj almozpete vagadis sur la stepo, kaj tiel mizere ili vivis unu jaron en vento kaj neĝo. Veninte al la gubernio Kjumalaj ili estis devigitaj fariĝi sklavo de brutoposedanto Kekidĉojlo, kiu traktis ilin kvazaŭ lupoj ŝafidojn.

La sesjara Rico tage paŝtis bovidojn por la brutoposedanto, kaj nokte dormis en stalo. Ŝi multe suferis de subpremado kaj ekspluataĉo. Iun neĝventan nokton, ŝafoj en la stalo ekblekis surprizite. La filo de la brutoposedanto entrudiĝis en la stalon kaj ordonis Ricon, kiu sin varmigis apogiĝante ĉe la ventro de ŝafo, al la jurto por grati la korpon al lia patro. La lasta suferis haŭtan malsanon tra la tuta korpo, kvazaŭ lepra hundo. Longtempa gratado lacigis Ricon, kaj ŝi ekdormetis. La kruela brutoposedanto tuj sin levis, forte batis ŝin per vipo kaj punis ŝin per sideo en neĝo por tri diurnoj permesante al neni ŝin helpi.

Plorĝemado de Rico pro malsato kaj frostoj pikis la koron de aliaj sklavoj. Iu maljuna sklavo ŝtele proksimiĝis al ŝi, kovris ŝin per preparita ŝaffelo kaj donis al ŝi pecon da sekalpano ŝparitan el sia porcio.

Kvin jaroj forpasis. La 11-jara Rico estis malpli alta ol butera sitelo. La brutoposedanto tamen ordonis ŝin stari sur teramaso kaj kirli kremon kiel plenaĝulo. Ŝi ofte svenis pro peniga laboro kaj falis de sur la teramaso, kio neeviteble kaŭzis al ŝi kruelan batadon.

Leviĝis la suno. Malaperis mallumo. En 1958 la Komunista Partio de Ĉinio sendis laborgrupon



Rico

al la paŝta regiono de Kinghaj-provinco por komenci la movadon de la demokratia reformado*. La vasta altebenaĵo sin banas en plena sunbrilo. Kiam kadro de la grupo kondukis Ricon al sia loĝejo, metis sur ŝin novajn vestojn kaj alportis al ŝi aroman te-lakton, la sklavo, kiu perdis ekde sia kvinjaraĝo la gepatrojn, unuafoje sentis la varmon de la Partio kaj eklarmis pro kortuŝiĝo.

La laborgrupo decidis lernigi al Rico kuracan teknikon ĉe kuracistoj de la grupo por ke ŝi fariĝu kuracistino de la tibetanoj mem. Tio ŝin mirigis kaj ĝojigis: “Kiel bone estas ke la liberigitaj paŝtistoj povas havi sian propran kuraciston! Sed, ĉu mi malklerulo povas sukcesi en la lernado?” Kamaradoj de la laborgrupo kuraĝigis ŝin dirante: “Jes, ankaŭ vi devas esti mastro de la ŝtato!” “Esti mastro?” Rico mire murmuris. Ili rakontis al ŝi pri la vero de revolucio, Rico atente aŭskultis kaj fariĝis pli serena en sia koro.

Informiĝinte ke Rico lernis kuracan teknikon en la laborgrupo, klasa malamiko diris malice: “Vi lernas kuracan teknikon de hanoj, ili certe forkondukos vin.” Sed Rico refutis: “Ili estas senditaj de Prezidanto Maŭ, kial malbone estas, ke mi sekvos ilin?!” La malamiko minacis dirante: “Virino, kiu lernas kuracon, incitos demonojn, ni



Rico kaj de ŝi savita tibetana knabo

ne prenos vian medikamenton!” Rico riproĉis lin kaj diris decideme: “Sed paŝtistoj certe prenos ĝin!”

La Partio multfoje sendis Ricon al trejnaj kursoj de kadroj kaj kuracistoj fonditaj de la aŭtonoma subprovinco por lerni. Ŝi diligente studis la brilajn verkojn de Prezidanto Maŭ *Servu al la Popolo*, *Memore al Norman Bethune* k.a., kaj kuracajn teknikojn, tial ŝiaj politika konscio kaj kuraca tekniko senĉese progresis. En 1960, ŝi estis enoficigata kiel flegistino en la Popola Hospitalo de Kĵumalaj-gubernio. Sed konsiderante, ke mankas al la stepo kuracistoj kaj medikamento, kiujn urĝe bezonas klasaj fratinoj, kiuj havis saman sorton kun ŝi, Rico volis reveni al la stepo por labori kiel sanitaristino neapartigita de paŝtado. Ŝi esprimis sian volon al la partia organizo kaj la lasta donis sian aprobon kaj subtenon al ŝi.

En la komenco de 1961, Rico revenis al Cuoĉi-brigado. Ŝi decidis per sia servo transdoni varman zorgon de la Partio al la vastaj amasoj de tibetanaĵ paŝtistoj kaj dediĉi sian junecon al la socialisma stepo. Ŝi unuflanke persistas en la kolektiva laboro kaj aliflanke plenumas kuracan laboron. Pli frue ol aliaj ŝi ellitiĝis por melki bovinojn; malpli frue ol aliaj ŝi dormis por fari lanŝpinadon. Ŝi ĉiam konkure prenis sur sin pezajn laborojn, pro tio en ĉiu jarfino si estis elektita kiel bona komunumano. Malgraŭ danĝeraj monto kaj rivero, timante nek ursojn nek lupojn, ŝi ofte sola rajdis

sur poefago por rondira kuracado al produktaj grupoj kaj laborgrupetoj. Ekhavinte infanon, ŝi do disponis du poefagojn, unu por la infano kaj la medikamenta kesto, kaj la alia por si mem.

III

En 1968, Cuoĉi-brigado akiris alian bonan rikolton en paŝtado. Vintre la paŝtistoj ĝoje donis kaj vendis al la ŝtato grasajn bovojn kaj ŝafojn. Antaŭ la pordo de ĉiu familio oni okupiĝis pri buĉado de bovoj kaj ŝafoj por prepari vintrajn vianĉaĵojn, kaj en jurtoj amasiĝis paketoj da butero kaj sakoj da laktaĵoj.

En novembro Li Hjueliang, la hana librotenisto de Kĵumahe-komunumo, kaj aliaj kadroj venis al Cuoĉi-brigado por helpi diversajn produktajn grupojn en aranĝado de rimedoj por protekti brutojn kontraŭ frosto kaj en jarfina distribuado. La tibetanaĵ komunumanoj varme bonvenigis ilin kaj intime nomis ilin “kadroj senditaj” de la Partio kaj Prezidanto Maŭ. Rico ilin prizorgis aparte.

Foje, Li Hjueliang vundiĝis falinte de sur bruto survoje. Informiĝinte pri tio, Rico haste rapidis al la akcidentejo kaj tuj kune kun aliaj tibetanaĵ kadroj portis la vunditon en la proksiman jurton de iu paŝtisto.

Kiel kuracistino en la paŝtejo Rico neniam renkontis pacienton kun tiel grava vundo. Sed, kun la fajra amo al la hana frato ŝi ĉiam restis ĉe la vundito por lin flegadi. Ŝiaj okuloj estis iom enkaŝigitaj pro maldormado dum pluraj tagoj.

Kuracisto de la komunumo unuapaŝe diagnozis, ke Li Hjueliang vundiĝis je la vertebraro kaj devis tuj enhospitaliĝi.

Por ne prokrasti kuracadon al li, Rico proponis, ke oni portu lin laŭ proksima vojo trans Bajansesuo-neĝmontego 5,800 metrojn alta super la mara nivelo por rekte atingi la Kinghaj-Tibetan Ŝoseon kaj tie transporti la pacienton per aŭto al hospitalo. La revolucia komitato akceptis ŝian proponon kaj elektis ne Ricon tamen aliajn 6 fortikajn milicanojn kaj unu hanan kuraciston de la komunumo kiel akompanantojn de la paciento, pro la malfacile irebla vojo. Sed Rico obstine petis, ke ŝi nepre estu akompananto. Ŝi diris: “Kamarado Hjueliang vundiĝis por ni tibetanaĵ paŝtistoj. La hana kuracisto povas anstataŭi min en akompanado, sed ne povas anstataŭe montri la amon de la tibetana kuracisto al la vundito!”

La brankardistoj ekmarŝis kontraŭ neĝvento. Rico ĉiam iradis ĉe la brankardo, jen bone kovrante

la vunditon per litaĵo, jen forigante neĝflokajn de sur li, jen subtenante la brankardon ĉe krutaĵo. Ĉe intermonto, neĝo profundis ĝis talio kaj oni suferis de grava altmonta reakcio. La brankardistoj devis doni grandan forton por fari ĉiun paŝon antaŭen. Kvankam Rico kapturiniĝis kaj volis eĉ vomi, tamen ŝi rapide prenis sur sin la brankardon, kriante “lasu ĝin al mi!” kiam ŝi vidis ke iu brankardisto enfalis en neĝkavon. Kun ŝtala energio ŝi portadis alterne kun aliaj kaj finfine ili atingis la ŝoseon trans la neĝmonto.

Aŭdinte ke baldaŭ alvenos aŭto, Rico, kiu jam estis lacigita dum sep tagnoktoj, ĉirkaŭiris refoje la brankardon por bone meti litkovrilon al la vundito kaj poste ŝi bedaŭre adiaŭis la brankardistojn.

En la kvar sezonoj ĉiujare Rico kun medikamenta kesto faras kuracadon rondire sur la vasta stepo, de paŝtejo al paŝtejo, de produkta grupo al produkta grupo, kaj per tio ŝi tagnokte transportas la varman zorgon de la Partio al ĉiu paŝtisto.

**Pro malsamaj karakteroj de disvolviĝo de naci-malplimultaj regionoj, la Komunista Partio de Ĉinio kaj la popola registaro faris la socian reformon en tiuj regionoj ankaŭ en malsamaj tempoj, manieroj, paŝoj k. a. Kinghaj-provinco estis liberigita en 1949 kaj oni komencis tie demokratian reformon en 1958, de kiam la feŭda servutula sistemo estis ĝisfunde frakasita kaj la sklavoj fariĝis mastroj de sia sorto.*

Vojaĝo sur Baŭtoŭ-Lanĝoŭ-a Fervojo

ANTAŬE se oni volis veturi de Baŭtoŭ, la grava urbo de la Nordo, al Lanĝoŭ, la antikva urbo de la Nordokcidento, ili devis trapasi dezerton okcidente de Ordos-altebenaĵo kaj Tengeri-dezerton per la unika veturilo kamelo — “la ŝipo de la dezerto”. En la jaro 1958 la Baŭtoŭ-Lanĝoŭ-a Fervojo estis konstruita kaj ekfunkciigata. De tiam fajfado de trajnoj anstataŭis la tintadon de kamelaj sonoriletoj, kaj tra la vastaj dezertoj galopadas trajnoj suden aŭ norden plensarĝitaj per karbo, fero, ŝtalo, petrolo, greno kaj aliaj varoj.

La nomita fervojo estas la unua fervojo de Ĉinio tra dezerto. En la tempo inter somero kaj aŭtuno de 1973 niaj raportistoj faris vojaĝon sur tiu ĉi fervojo. La trajno startis de Baŭtoŭ okcidenten tra la River-kurbiĝa Regiono de la Flava Rivero en Interna Mongolio kaj poste iris suden laŭlonge de la Flava Rivero en la dezerton okci-

dente de la altebenaĵo Ordos. Post pli ol dek horoj la trajno eniris Jinĉuan-ebenaĵon kun reto da kanaloj kaj vojetoj. La trajno ses fojojn kuris tra la sudorienta rando de Tengeri-dezerto kaj atingis la lastan stacion Lanĝoŭ, post triafoja transpaso de la Flava Rivero sep kilometrojn fore de Lanĝoŭ, kie la fervojo sinligis kun la fervojoj Gansu-Lianjungang-a, Lanĝoŭ-Hingiang-a kaj Lanĝoŭ-Kinghaj-a.

La Baŭtoŭ-Lanĝoŭ-a Fervojo longas mil kilometrojn, el kiuj pli ol 140 troviĝas en dezertoj. La plej longa parto en la loko nomata Ŝapotoŭ longas je 16 kilometroj, kie la sablotavolo eĉ dikas je 30-100 metroj. Pelate de vento la sablomontetoj moviĝis sudorienten kaj grave minacis la fervojon kaj pro tio oni nomis tiun ĉi parton “apendico” de la Baŭtoŭ-Lanĝoŭ-a Fervojo. Antaŭe, kiam trajno proksimiĝis al Ŝapotoŭ, pasaĝeroj tuj haste

fermis fenestrojn kaj surmetis al si buŝumon por ŝirmi sin kontraŭ sableroj. Sed nun la fizionomio fariĝis tute alia: Sur la onde leviĝantaj sablomon-tetoj la larĝaj forstozonoj garde staras kiel verda murego ambaŭflanke de la fervojo, tial la aero estas tre freŝa kaj agrabla por la pasaĝeroj en vagonoj.

En la pasintaj dekkvin jaroj la fervojistoj kaj sciencaj laborantoj faris intensan kaj penigan batalon kontraŭ la dezerto por garantii glatan trafikadon al la fervojo. Ni kun plena ĝojo kaj respekto vizitis Ŝapotoŭ. Dank' al prezentado de la tieaj fervojistoj ni konis ĝiajn pasintecon kaj hodiaŭon.


Antaŭ la Liberiĝo Ŝapotoŭ estis senhoma sabla maro. Antaŭ pli ol 40 jaroj iu militaristo ordonis siajn soldatojn konstrui aŭtovojon en la dezerto per granda kvanto da pordklopoj kaj lignoj forrabitaj de popoloj celante grandigi sian sferon kontraŭ siaj rivaloj. Sed li rikoltis nenion alian krom tio ke la pordklopoj kaj lignoj estis enterigitaj kaj ankaŭ liaj aŭtoj profunde eniĝis en sablon. Por fortigi sian regadon super la popoloj de Interna Mongolio kaj la vasta nordokcidenta Ĉinio

la kuomintangaj reakciuloj ankaŭ revis konstrui tie fervojon, tamen antaŭ la altaj sabloamasegoj ili povis nenion fari kaj fine ili venis nur al jena konkludo: Neimageble estas konstrui fervojon en la dezerto.

Post la Liberiĝo la Komunista Partio de Ĉinio donis grandan zorgon al la konstruaj aferoj de la nordokcidenta Ĉinio kaj metis konstruon de la Baŭtoŭ-Lanĝoŭ-a Fervojo sur gravan lokon en la Unua Kvinjara Plano de nia nacia ekonomio. En septembro de 1955 la konstruado komenciĝis. Sub la gvido de la Partio la vojkonstruantoj kun mastra sinteno kaj arda revolucia entuziasmo pene luktis kontraŭ la abomeninda sablovento por konstrui la fervojon en la vasta senhomejo. Furioza ventego el Tengeri-dezerto forblovis la tendojn de la vojkonstruantoj kaj ĵetis ilin dekojn da futoj foren kaj ankaŭ la bone surmetita trakbazo kun pli ol 10,000 kubmetroj da sablo estis forblovita sen spuro. Sed laboristoj netimigeblaj denove alportis pli ol centmil kubmetrojn da rulŝtonoj per pli ol 1,000 kameloj por rekonstrui la trakbazon. Ili pretigis sablan bazon kaj tuj premis ĝin per la rulŝtonoj. Krome ili konstruis digojn kaj kontraŭ-

Fiksado de moviĝanta sablo per pajla reto





Ambaŭflanke de la fervojo instaligis aparatoj de arta pluvado por garantii bonan funkciadon de la fervojo kontraŭ atako de sablovento.

sablajn barilojn ambaŭflanke de la fervojo, kaj tiamaniere la fervojo estis konstruita en mallonga tempo.

Fervoj-konstruado estas malfacila, kaj tia estas ankaŭ la vojflgado. Kiam la fervojo trairanta Tengeri-dezerton estis sternita, tuj venis tien vojflgantoj, kiujn oni nomas "fervojaj gardistoj", dividitaj en ses laborsekciojn. De tiam la dezerto dorminta milojn da jaroj ekhavis siajn loĝantojn. Malfacila estis la vivo en la dezerto: Mankis al ili kaj akvo kaj legomoj. Tamen ili konsideris sian taskon glora kaj persistis ĉe la laborposteno sen ia ajn plendo. Kiam leviĝis ventego, sableroj blovitaj ĝis alteco de cent metroj alruliĝis kiel nuboj demalproksime kaj ŝutiĝis sur la fervojon. Post sabla uragano ili pene ŝovelis la sablon kaj purigis la fervojon tiel ke la funkcio de la fervojo estis bone garantiita.

Samtempe kun tio disvolviĝis amasa scienca eksperimentado por sablo-jungado kaj vojprotektado. Kaj tion unue faris ĉe Ŝapotoŭ laboristoj de arbo-kultivejo de la Langouŭ-a Fervoja Administracio kaj sciencaj laborantoj de la Institucio

pri Glacirivero, Frostiĝinta Grundo kaj Dezerto de la Ĉina Akademio de Sciencoj. Ili plektis sur la sablomontetoj pajlajn retojn kun maŝoj de unu kvadrata metro, kiuj efike senmovigis la sablon.

La metodo estis efika, sed ne longdaŭra pro tio ke la pajloj iom post iom putriĝis kaj fine eĉ perdis efikon post longtempa ventumado kaj sunumado. Tial la sciencaj laborantoj kaj la fervojistoj ekklopodis por senmovigi sablon per vegetalo.

La scienca eksperimenta grupo venis en la internon de Tengeri-dezerto kaj tie faris multflankajn esplorojn. En varma somero la temperaturo de surfaco de la dezerto altas je 60-70 gradoj C. kaj pro tio ofte estiĝis vezikoj al plandoj de homoj. Tamen ili konsideris ke tiu tempo estas la plej bona sezono por akiri sciojn pri la temperaturo de la tero kaj aero, pri akvokvanto tenata en la sablo kaj vaporumita akvokvanto kaj pri kreskado de vegetaĵoj en dezerto. Dum frosta vintro ĉiam furiozis frida ventego, sableroj frapis homojn kaj oni ne povis malfermi la okulojn, tamen la grupoj opiniis, ke la sezono estas ĝuste la plej bona tempo por observadi la direkton kaj rapidecon de

vento kaj koni la leĝon de moviĝo de sablomontetoj. Dank' al detalaj kaj ekzaktaj enketado, esplorado kaj scienca eksperimentado dum pli ol du jaroj ili unuapaŝe konis la leĝon pri moviĝo de sablomontetoj kaj kreskado de vegetaĵoj. Ili prove plantis vegetaĵojn kun granda vivipovo kaj potenca radikaro kiel vepro, sablo-saliko kolektitaj en la dezerto kaj enkondukitaj de aliaj lokoj. La rezulto montris, ke 80% de la plantaĵoj postvivis, kiuj bonefike senmovigis la sablomontetojn laŭlonge de la fervojo.

La Granda Proleta Kultura Revolucio elvokis pli viglan aktivecon ĉe la fervojistoj en konstruado de socialismo. Resuminte la sperton de sablobridado ili pliapaŝe provis: Konduki la akvon el la Flava Rivero en Tengeri-dezerton por krei pli bonajn kondiĉojn al sablosenmovigo.

Sub la helpo de la lokaj malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj kaj de koncernaj unuoj oni komencis la mekanikan akvokondukan konstruaĵon en la komenca periodo de 1968. Tiam la Flava Rivero ankoraŭ estis kovrita de maldika glacitavolo. Malgraŭ akraj glaciaĵoj la laboristoj

ensaltis la riveron por pli frue konstrui domon por maŝinoj. Ĉar la veturado de ĉaroj estis malfacila sur sablomontetoj, ili do tiris per ŝnuroj aŭ portis surŝultre gistubojn 300-350 kilogramojn pezajn trans sablomontetojn. Iu komunumano frotvundiĝis je la ŝultro. Li kovris la vundon per sia viŝtuko kaj denove ĵetis sin en laboron. Kiam oni admonis lin al ripozo, li diris ridante: "Por bridi sablon por revolucio, mia malgrava vundo signifas nenion. Ni preferas pli multe peni hodiaŭ por ke niaj postuloj ne plu suferu atakojn de sablo." En la dezerto ili konstruis domojn por pumpiloj, akvocisternojn kaj instalas akvokondukan tubon longan je 6,000 metroj kaj aparatojn de arta pluvo. Nun oni povas akvumi per akvo alkondukita el la Flava Rivero vicojn da arboj kaj arbustoj, agrikulturajn plantaĵojn kaj fruktarbojn kiel tritiko, arakido, tomato, pomo kaj aliaj.

Hodiaŭ kiam trajno trakuras tiun lokon, la pasaĝeroj povas vidi kun ĝojo ke la kulturitaj plantaĵoj laŭlonge de la fervojo ĉiam prospere kreskas de printempo ĝis aŭtuno. La diversaj fruktarboj disfloras sinsekve kaj tio alportas belecon kaj vivecon al la antaŭa dezerto.



Sciencaj laborantoj de la Institucio pri Glacirivero kaj Frostiĝinta Grundo kaj Dezerto de la Ĉina Akademio de Sciencoj faras eksperimenton pri fotosintezo de vegetaĵoj sur sablo.

Hodiaŭa Tajhu-lago


Tajhu-lago kun areo de 2,213 kvadrataj kilometroj estas unu el la fame konataj lagoj de nia lando. Ĝi kuŝas inter la provincoj Giangsu kaj Ĝegiang kaj abundas je akvoproduktaĵoj, precipe je arĝenta fiŝo (*Protosalax hyalocranius*). La vasta bordo de la lago kun milda klimato, reto da riveroj kaj fekunda grundo estas unu el la altproduktaj regionoj de greno de Ĉinio kaj portas la nomon “lando de fiŝo kaj rizo”.


Ekde la fondiĝo de popola komunumo, apudlagaj kamparanoj konstruis multajn elektrajn drenajn kaj irigaciajn sistemojn, pli kaj pli multe aplikas agrikulturajn maŝinojn kaj kemian sterkon, multigis la kampojn de kelkfoja rikolto kaj donas bonan mastrumadon al la kampoj, el kio rezultis impeta kresko de grena produktokvanto. Ekzemple en 1973 la hektara produktokvanto de greno de Vuhi-gubernio pliiĝis je 166% kompare kun tiu de la komenca periodo post la Liberiĝo. Ankaŭ aliaj produktoj akiris plenan disvolvon. Kaj multe grandiĝis en la lastaj jaroj la produktokvantoj de morusa silko, Biluoĉun-teo tre famaj en kaj ekster la lando, persiko de Vuhi, eribotrio de Dongting-monto kaj miriko.

La pitoreskaj urboj Suĝoŭ kaj Vuhi apud la lago, kiuj estis paradizo por burokratoj kaj kapitalistoj antaŭ la Liberiĝo, hodiaŭ havas industriajn kvartalojn, en kiuj troviĝas industrioj ŝtala, maŝina, kemia k.a. La disvolvo de la industrio forte subtenis la agrikulturon.

Tagon post tago ŝanĝiĝas la fizionomio de tiu regiono, kaj tagon post tago boniĝas la vivo de la tieaj popolanoj.

Ĉiam pli prospera komunumo apud la lago





Ĝu Bingnan (la meza), sekretario de la kompartia komitato de komunumo enketas pri maŝinplugado.

Bona zorgo al floranta kolzo estas rimedo kontraŭ insekto kaj malsano por altigi produktokvanton.

Kampoj ĉe la lago. Komunumanoj akiris riĉajn rikoltojn en sinsekvaj jaroj.



Nove ekspluatita
te-gardeno sur
montetoj ĉe la
lago




Refoja riĉa rikolto






Abunda rikolto de fiŝbredado




La unua fiŝbreda grupo de Helie-komunumo kreis en sinsekvaj altproduktan rekordon en fiŝbredado. Jen komunumanoj doksigenon al fiŝo per maŝino.

Anseraro





ching-gubernio apud
ajhu-lago abunde pro-
uktas bambuson kaj
ambuĝermon.




Nova industria kvartalo

Silka industrio de Tajhu-regiono kun longa historio akiris rapidan disvolvon post la Liberiĝo. Jen laboristinoj lernas unu de alia.



Rikoltado de printempa
okono





Pitoreska Hubin-parko



Komunumanoj zorge mastrumas persikĝardenon.

Ĉu Konfucio estis “tutpopola pedagogo”?

LA ĉinaj reakciaj regantoj de ĉiuj dinastioj adoris Konfucion kiel “ekzemplon por dekmil generacioj”. Ankaŭ la burĝaro kaj ĉefoj de oportunisma linio en la Kompartio energie laŭdis la edukan tezon de Konfucio “*ĵoŭ ĝiaŭ vu lej*” kiel edukadon al lernantoj sen prikonsidero de klasa aparteno, ŝminkante lin kiel “tutpopolan pedagogon”.

Ĉu estas ia vero en tio?

Tion ni devas ekzameni per la helpo de Marksismo kiel mikroskopo kaj teleskopo.

KIAN EDUKON DONIS KONFUCIO?

Konfucio vivis en la lasta periodo de Printempo kaj Aŭtuno, en la tempo de granda socia ŝanĝiĝo, en kiu Ĉinio transiris de sklava sistemo al feŭdisma sistemo. Konfucio obstine persistis en la reakcia starpunkto de la dekadencia sklavposedanta aristokratio, intencante malhelpi la antaŭeniron de la historio. Li treege malamis siatempajn sociajn ŝanĝiĝojn, veante ke “mankas vero en la mondo”, “disfalas la etiketo kaj difektiĝas la muziko”. Li prenis kiel sian mision restarigi la sklavsistemon de la Okcidenta Ĝoŭ-dinastio, elmetante reakcian politikan-etikan idearon kun “*ĵen*”-o kiel la kerno, kaj pledante brue por restarigi la pereintajn regnojn de sklavposedantaj aristokratoj, daŭrigi ties heredan privilegion kaj reenpotenci tiujn defalintajn. Li migradis tien kaj tien de regno al regno kun la sola celo akiri pozicion por efektiviĝi sian aspiron restarigi la sklavan sistemon de Ĝoŭ. Cetere li fondis lernejon kaj varbis disĉiplojn por eduki ilin en “*ĵen*-ulojn”, “energiajn strebulojn”, “noblulojn” kaj “saĝulojn”, povantaj rigore observi “etiketon de Ĝoŭ-dinastio”, por restarigi sklavsistemon dank’ al tiuj, kiuj celis “fariĝi burokratoj post sukcesa sinklerigo”. Tio montris ke la eduka aktivado de Konfucio estis en servo al la reakcia politiko de sklavposedantaj aristokratoj. Tiu reakcia

politika celo determinis lian edukan linion kaj penetris en ĉiujn flankojn de lia tuta eduka aktivado.

Kiajn homojn Konfucio povis akcepti en sian disĉiplaron kun tia celado? Ĉu li akceptus lernantojn sen distingo de klasa aparteno?

La du antagonismaj klasoj en la sklava socio estis sklavoj kaj sklavposedantoj. Oni vidu antaŭ ĉio, ĉu Konfucio akceptis lernantojn el la plej vasta klaso de tiu socio — sklavaro. En la epoko de sklavsistemo sklavposedantoj tute ne traktis sklavojn kiel homojn. Por ili la lastaj estis nur “instrumentoj kun parolkapablo”, kiel povus esti lasitaj edukiĝi? Fakte, ankaŭ Konfucio mem senkaŝe ekskluzivis sklavojn el siaj disĉiploj. Elirante el ideisma transcendentalismo, li dividis homojn en jenajn klasojn: la plej superaj estas homoj “sciantaj denaske”, post tio estas homoj “sciantaj post lernado”, pli poste “lernantaj pro malfaciloj”, kaj la plej malsuperaj estas la sklavoj kiuj “ne lernas antaŭ malfaciloj”. Krome, li eksplicite deklaris ke “la superaj saĝuloj” kaj “la malsuperaj stultuloj” ne ŝanĝiĝas, do laŭ li la denaske “malsaĝaj” sklavoj estas tute nekultureblaj. Pro tio li malice trumpetis: “Al la popolo oni povas ordoni kion fari, sed ne devas havigi sciojn.” Kiel klara estis la reakcia starpunkto de tiu dekadencia sklavposedanta aristokrato malamika al la sklavoj!

Konfucio reklamis: Mi ne rifuzas eduki tiujn, kiuj prezentas al mi nur faskon da sekigita viando. Sed tiu reklamo ĝuste malkaŝis la veron de la falsa aserto ke Konfucio akceptis lernantojn sen distingo de klasa aparteno. Respondu, ĉu en la sklava socio, en kiu kvin sklavoj kostas nur unu ĉevalon kaj faskon da silko, sklavo posedanta nenion alian ol personan malliberecon, povus doni faskon da sekigita viando kiel lernopagon? Kompreneble, inter la multaj disĉiploj de Konfucio nombrintaj “3,000 lernantojn, inter kiuj troviĝis 70 elstaraj”, ankaŭ iuj estis malriĉaj, ekzemple Jan Juan, Zeng

Can kaj aliaj, kiujn iuj servigis kiel ateston, ke Konfucio akceptis lernantojn sen distingo de klasa aparteno. Sed fakte la prauloj de Jan oficis en 14 generacioj en la regno Lu, do ili ĉiuj estis inter la vicoj de oficistoj de diversaj rangoj, kaj komenciĝis malprosperi nur de lia patro. Zeng Can estis posteulo de heredprinco Vu de la regno Zeng aneksita de la regno Lu. Do, tiuj homoj estis de familioj de disfalintaj sklavposedantaj aristokratoj. Ili estis membroj de sklavposedanta klaso, malgraŭ ke ili estis malriĉaj kompare kun siaj riĉaj samklasanoj.

Ankoraŭ estis aliaj inter disĉiploj de Konfucio atribuataj al malalta deveno, ekzemple, la patro de Ĵan Jong estis “malnobelo”, Zigong estis komercisto, ktp. Tamen, ankaŭ tio ne povis pruvi ke Konfucio akceptis lernantojn sen distingo de klasa aparteno. Ĉar por sklavposedantaj aristokratoj nur kiuj posedas potencon kiel oficistoj estas nobelaj, dum la aliaj kiuj sin okupas kiel terkulturistoj, metiistoj kaj komercistoj, estas malnobelaj. Konfucio foje diris: “Mi dum juneco estis malnobela, sekve kapablas fari multajn aferojn malsuperajn.” Sed Konfucio ne estis sklavo, li devenis de dekadenciĝinta sklavposedanta aristokrato. Do, “malnobela” signifas nur “ne esti oficisto”, kaj “malsuperaj aferoj” aludis nur metiojn. Sekve, la patro de Ĵan Jong, kiel “malnobelo”, estis fakte homo sen oficista posteno. Kaj Zigong, kiel registrite en la *Historia Libro* de Sima Kian, estis granda komercisto de la regno Vej “veturanta per kvarĉevala ĉaro kaj havanta riĉaĵojn sennombrajn”, evidente komercisto-sklavmastro. Tial, la tiel nomata “sen elekto inter nobelaj kaj malnobelaj”, en maksimumo, estis nur sen diferencigo inter havo kaj malhavo de oficista posteno de homoj el klasoj kaj tavoloj ekster sklavaro.

El tio kion Konfucio instruis al siaj disĉiploj, estas ankaŭ videbla, ke li tute ne praktikis “tutpopolan edukadon”. Por servigi liajn lernantojn al la sklavposedantaj aristokratoj, la studobjektoj destinitaj de Konfucio estis nenio alia ol *li, jue, si* kaj *ŝu* (etiketo, muziko, poemoj kaj historiaj dokumentoj), precipe la etiketo de Ĝoŭ-dinastio. Laŭ Konfucio la lerno de etiketo estis la bazo, nur sur sistema ellerno de la regularo kaj dekretoj de la sklava sistemo utilis lerno de aliaj scioj. Ĉio koncernanta produktajn laborojn ne estis lernata, eĉ ne lerninda. Foje, Fan Ĉi, unu el disĉiploj de Konfucio, demandis lin pri kulturado de grenoj kaj legomoj, la lasta malkontente respondis: “Mi estas malpli sperta ol maljuna terkulturisto.” “Mi estas malpli lerta ol maljuna ĝarden-

isto.” Post foriro de la demandinto, li eĉ insultis: “Malnobela estas Fan Ĉi!” Ĉu ne estus strangajo, se Konfucio, kiu tiel malŝatis sian disĉiplon volantan partopreni en produkta laboro kaj malamis laborantan popolon, akceptus sklavojn en siajn disĉiplojn?! Prezidanto Maŭ diris: “**Kio estas scio? Ekde la ekzisto de klasa socio, estas en la mondo nur du specoj de scio, nome: scio de la porprodukta batalo kaj scio de la klasa batalo.**” Konfucio kvankam blufata de bienularo kaj burĝaro kiel dio super dioj, fakte ne sciis labori, nek terkulturi, kaj estis blinda pri la historia evolua tendenco de la siatempa socio. Li estis nur malsaĝulo kaj parazito “kun membroj mallaboremaj, kiu ne scipovas diferencigi la kvin grenojn”, kaj tute ne indas esti instruisto, en la okulo de laboranta popolo.

Prezidanto Maŭ diris: “**Certa kulturo (kiel ideologia formo) estas reflekto de la politiko kaj ekonomio de certa socio kaj donas returne grandan influon kaj efikon sur la politikon kaj ekonomion de tiu socio; dume ekonomio estas la bazo, kaj politiko estas la koncentrita esprimo de ekonomio. Tio estas nia fundamenta vidpunkto pri la rilato de kulturo al politiko kaj ekonomio, kaj pri la rilato de politiko al ekonomio.**” (*Pri Nova Demokratio*) En ĉiu ajn epoko, edukado ĉiam estas en servo al la politiko de la tiuepoka reganta klaso. Ĉu en la antikveco aŭ en la nuntempo, ĉu en Ĉinio aŭ en alilando, neniam estas, nek povas esti la superklasa aŭ tutpopola edukado. Ankaŭ Konfucio ne estis t.n. “tutpopola pedagogo”.

KIA VARO ESTIS LA EDUKA TEZO DE KONFUCIO?

Iuj eksplikis, ke la eduka tezo de Konfucio “*joŭ ĝiaŭ vu lej*” estis edukado sen klasa distingo. Tia komento estas tre absurda.

En la sklava socio de antikva Ĉinio, la klana patriarka sistemo estis daŭrigata kun tre kategoria hierarkio. Ne nur klara apartigo regis inter diversaj klasoj, ke la kleruloj, terkulturistoj, metiistoj kaj komercistoj ne devis sin miksi, tiel ke la idoj de kleruloj ĉiam restis kleruloj, la idoj de terkulturistoj ĉiam restis terkulturistoj, ktp., eĉ la diversaj tavoloj de la reganta klaso, sklavposedantaj aristokratoj, kiel princo, vasaloj, superaj oficistoj k.a. estis nur heredaj kaj ne permesis al si libere uzurpi rajtojn de pli superaj rangoj. Konfucio kiel persista defendanto de “etiketo de Ĝoŭ-dinastio”, tre ĉagreniĝis pri la disfalo de la hierarkio kaj energie alvokis daŭrigi rigore la malnovan ordon de “konvena konduto de la Ĉiela Filo (la suvereno)

kaj subuloj, patroj kaj filoj ĉiuj laŭ ilia pozicio respektive". Por li estis absolute maleble mem "disrompi la klasajn limojn", sekve estis evidente ke lia "sendistingo" aludis tute alian aferon ol "disrompon de klasaj limoj".

Laŭ la vortoj de Konfucio registritaj en *Lun Ju*, la "homo" kaj la "popolo" estis du konceptoj malsamaj inter si. La unua temis pri individuoj el la klasoj kaj tavoloj aliaj ol sklavoj kiel la sklavposedantaj aristokratoj, ordinaraj sklavposedantoj, nove leviĝantaj terposedantoj, individuaj laboruloj; dum la "popolo" temis pri sklavoj sole. Adekvate la konceptoj "eduko" kaj "trejnado" estis ankaŭ malsamaj. Laŭ Konfucio, la objekto de la unua estis "homo" kaj de la dua — "sklavo". Ricevi "edukon" estis afero libervola sen devigo kaj ĝia kondiĉo estis nur livero de lernopago, tial la "eduko" de Konfucio havis la signifon, kiun ni nuntempe havas. Dume, lia "trejnado" kiu rilatis al sklavoj, kun la "popolo" kiel objekto, tenis en si la enhavon de milita trejnado kaj ideologia altrudo. La rilatoj inter la donantoj kaj ricevantoj de "trejnado" estis tiuj inter regantoj kaj regatoj. Kaj ricevo de trejnado estis senkondiĉa, deviga kaj nelibervola, kun karaktero tute malsama kompare kun "eduko".

La konfuzo inter la du aferoj "eduko" kaj "trejnado" estas eraro. El la origina frazo de Konfucio: "*joŭ ĝiaŭ vu lej*", la vorto *joŭ* uzata en la antikveco havis la sencon de "regiono"; kaj *lej* aludis pri klanoj, sed tute ne pri klasoj aŭ familia deveno.

Sekve, la vera senco de tiu frazo de Konfucio estis ke la sklavoj devas esti trejnataj laŭ regiono sen distingo de klanoj, sed ne aludis pri edukado al lernantoj sen distingo de klasoj. Dum la periodo de Printempo kaj Aŭtuno la aristokratoj de diversaj klanoj jam intermiksiĝis kaj same estis iliaj sklavoj, pro senĉesaj ribeloj de la sklavoj kaj aneksaj militoj kun sekvo de disfalo de la klana patriarka sistemo de sklavismo. Tial la regantoj ne povis plu regadi laŭ klanoj kiel en la tempo de la Okcidenta Ĝoŭ-dinastio, sed devis regadi laŭ diversaj regionoj. La tezo de Konfucio "*joŭ ĝiaŭ vu lej*", kiu pledis por deviga trejnado de sklavoj laŭ regionoj sen distingo de klanoj, celis, unuflanke, redukti la fortojn de la nove leviĝanta feŭda terposedanta klaso kaj protekti la interesojn de sklavposedanta klaso, kaj aliflanke, pli grave, plintensigi la regadon super sklavoj. Kiel oni povus identigi tion kun "disrompo de klasaj limoj" kaj "ĝeneraligo de edukado"?

Fakte neniu en la tempoj antaŭ Kin-dinastio eksplikis la signifon de la frazo "*joŭ ĝiaŭ vu lej*". La kompreno fremda por tiu frazo — edukado sen distingo de klasoj — estis trudita al ĝi de postaj komentariistoj, kaj tiu erara kompreno estis transdonata kaj utiligata de ideologoj de feŭda terposedanta klaso de generacio al generacio por iliaj politikaj bezonoj.

Unuvorte, la tezo de Konfucio kiel klarigata de postaj generacioj havis nenion komunan kun liaj edukaj aktivadoj kaj absolute ne devas esti uzata kiel la bazo por kompreni ĝin kiel "disrompon de klasaj limoj".

KIAL LA REAKCIULOJ ŜMINKIS KONFUCION KIEL "TUTPOPOLAN PEDAGOGON"?

Lenin iam diris: "**La nomo 'nepolitikeco' aŭ 'senpolitikeco' de edukado — tio estas hipokritaĵo de la burĝaro, tio estas nenio alia ol trompo al la 99 procentoj de la amasoj humiligitaj de la superrego de eklezio, privata proprieto ktp.**" ("Parolado en la Tutrusia Konferenco de la Politikaj Edukaj Konsilioj de Provincaj kaj Guberniaj Departementoj pri la Popola Klerigado") Ĝuste tiel staras la afero. La edukado praktikata de la burĝaro fakte ĉiam metas la burĝaran politikon sur la unuan lokon kaj ĝiaj lernejoj servas por kulturi talentulojn por ĝi kaj la "ĝenerala senpaga edukado" t.n. de ĝi estas uzata por trejni por ĝi sklavojn de la kapitalo. La burĝaro neniam pensis igi la edukadon "tutpopola edukado" sen distingo de klasoj. Tamen, por trompi la amason la burĝaro nekuraĝe malkaŝis tion, alte kantante pri "egaleco por ĉiuj en edukado"!

La burĝaro de Ĉinio estas hipokrita same kiel tiu de la Okcidento, ĝia aparteco estas nur ke ĝia ario pri superklasa edukado havas ian ĉinan koloron. La Movado de la 4-a de Majo eksplodinta en 1919 havis ĝisfundan senkompromisan karakteron kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo. La tiama kultura revolucio estis movado radikale kontraŭanta la feŭdisman kulturon, alte portanta la standardon de opono kontraŭ malnova moralo kaj malnova literaturo kaj pledo por nova moralo kaj nova literaturo. Ĝi elmetis la sloganon "for la Firmaon de Konfucio" oponante kontraŭ la adorado al Konfucio kaj legado de konfucianismaj klasikaĵoj, tiel ke la prestiĝo de Konfucio, "sanktulo" de la feŭdisma socio malleviĝis ĝis la nulo, kaj pro tio ĝi ludis grandan rolon en la historio. Post kiam Ĉiang Kajŝek faris la kontraŭrevolucion puĉon je la 12-a de aprilo, 1927, li tuj hastis al Kjufo de

Ŝandong-provinco por tie incensi al la Templo de Konfucio. Kaj poste li prenis la feŭdisman feĉon de Konfucio kiel gravan enhavon de lia feŭdisma, kompradora kaj faŝisma eduko. Ankaŭ la burĝaraj kleruloj kaj erudiciuloj importis de okcidenta burĝaro la varon de superklasa eduko por levi reakcian tajdon de adorado al Konfucio, metinte sur ĝin la etiketon de la Firmao de Konfucio, laŭ la bezonoj de Ĉiang-dinastio. La lakeo de imperiismo Hu Ŝi distrumpetis tezon de Konfucio ke “edukado povas disrompi la limojn de ĉiuj klasoj”, “nuligi la klasajn diferencojn”, kaj asertis, ke lia tezo “*joŭ ĝiaŭ vu lej*” estis “revolucia tezo sociskua”, energie klopodante por ŝminki Konfucion kiel “tutpopolan pedagogon” en servo al imperiismo, bienularo kaj kompradora burĝaro, sklavigi kaj veneni la ĉinan popolon. Ankaŭ la kuomintangaj kontraŭ-komunisma elemento kaj Trockiano Ĉen Boda fervore kriaĉis ke Konfucio en la praktikado de sia eduka tezo “havis sian apartan meriton” kaj estis “notinda orlitere en la kultura historio de Ĉinio”. Tiel Konfucio estis ŝminkita kiel “tutpopola pedagogo”. Tamen fakte tiu “tutpopola pedagogo” estis speciale modlita por kontentigi la bezonojn de la feŭda, kompradora kaj faŝisma diktaturo de la kuomintangaj reakciuloj. Bone rimarkigis Lusin: “En Ĉinio, Konfucio estas elstarigita de la potenculoj, li estas sanktulo por potenculoj aŭ aspirantoj al potenco kaj havas nenian rilaton kun la ordinara popolo.”

La agentoj de bienularo kaj burĝaro en la Partio Liu Ŝaŭki kaj Lin Biaŭ delonge distrumpetis la “doktrinojn de Konfucio kaj Mencio”. Post la Liberiĝo de la tuta lando ili heredis la reakcian fluon de adorado al Konfucio. Konforme al sia

aktivado de la kontraŭrevolucia restaŭro Liu Ŝaŭki kaj liaj kunuloj publike reĝisoris en 1961 la farson de “pilgrimo al la Templo de Konfucio” kaj organizis la t.n. “simpozion pri Konfucio”, provante per helpo de la fantomo de Konfucio renversi la diktaturon de la proletaro kaj restaŭri kapitalismon. Sekve la sensencaj absurdaĵoj pri tio, ke Konfucio praktikis “*joŭ ĝiaŭ vu lej*”, faris edukadon al lernantoj “rompinte limon de klasoj”, “ĝeneraligis edukadon” ktp. denove estis elŝovitaj. Tamen ili renkontis fortan rebaton de Prezidanto Maŭ kaj revoluciaj amasoj. Kaj kiam la kontraŭpartia kliko de Lin Biaŭ kovis en obskura angulo la kontraŭrevolucion intrigon por uzurpe kapti la potencon de la Partio, ĝi denove ekkultis Konfucion. La faktoj de la klasbataloj de post la fondiĝo de nia lando montris, ke respekto kaj malrespekto al Konfucio estis speguliĝo de la batalo inter restaŭro kaj kontraŭrestaŭro sur ideologia kampo. La celo de Liu Ŝaŭki kaj Lin Biaŭ, kiuj fervore ornamis Konfucion en “tutpopolan pedagogon” kaj propagandaĉis la tezon “*joŭ ĝiaŭ vu lej*”, estis nenio alia ol trovi teorianton bazon por ilia kontraŭrevolucia reviziisma eduklinio, nuligi la klasecon de proletara edukado, transformi niajn lernejojn en lokojn por kulturi daŭrigantojn de burĝaro kaj garantii ke la bienularo kaj burĝaro povu daŭre monopoli kulturan kaj edukatan aferojn, renversi la diktaturon de la proletaro kaj restaŭri kapitalismon. Sed la fantomo de Konfucio ne povis patroni la reakciulojn en la historio de ilia pereco, nek elsavi Liu Ŝaŭki kaj Lin Biaŭ. La Granda Proleta Kultura Revolucio kaj la movado de kritiko al Lin Biaŭ kaj Konfucio jam forbalais Liu Ŝaŭki kaj Lin Biaŭ kune kun de ili adorata idolo de Konfucio en historian rubujon.

Novaj Libroĵ el Vjetnamio

Skizoj pri la Usona Novkoloniismo (I), (II), (III)

La unua parto estas dediĉita al la studado de la usona novkoloniismo laŭ monda skalo, la dua al la studado de la usona novkolonia politiko en Sud-Vjetnamio, kaj la tria al la studado de la usona novkoloniismo en sudorienta Azio.

Eldonitaj de Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, prezo ne indikita, aĉeteblaj ĉe la Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, Ly Thuong kiet 68, Hanojo, Vjetnamio.

Kritiko kontraŭ la tezo de Konfucio “fariĝi burokrato post sukcesa sinklerigo”

ANTAŬ pli ol du mil jaroj, Konfucio energie distrumpetis sian tezon “fariĝi burokrato post sukcesa sinklerigo”, dirante ke “en terkulturado sin trovas malsato, en sinklerigo burokrata salajro”. Ankaŭ la fidela disĉiplo de Konfucio Lin Biaŭ senbride predikis tian tezon, dirante ke “diligenta lernado donas dekmiloblan profiton”, kaj malice kalumniis la sinhardadon de intelektaj gejunuloj en kamparo kaj montregionoj. Laŭ ilia reakcia logiko, kleruloj devas fariĝi burokrataj moŝtoj kaj rajtas tirani la popolon. Se oni laboras pri terkulturado kiel kamparanoj post sinklerigo, ili do fariĝos “plebanoj”. Kvankam Konfucio kaj Lin Biaŭ vivis en malsamaj historiaj epokoj, tamen iliaj reakciaj pensoj similas unu al la alia kiel du gutoj da akvo. Ambaŭ ili ekstreme malestimis fizikan laboron kaj la laborulojn. Por protekti la reakcian regadon de la ekspluataj klasoj, ili antagonismigis mensan laboron kontraŭ fizika kaj rigardis intelektulojn spiritaj nobeloj.

Lin Biaŭ opoziciis al la sinhardado de intelektaj gejunuloj en kamparo kaj montregionoj, tio estas kopio de la tezo de Konfucio “fariĝi burokrato post sukcesa sinklerigo”. Lia malica celo estas opozicii al kombiniĝo de ni, intelektaj gejunuloj, kun laboristoj kaj kamparanoj, konduki nin sur misvojon disiĝi de laboristoj kaj kamparanoj, de fizika laboro kaj proleta politiko por ke ni fariĝu socia bazo por lia restaŭro de kapitalismo. La kombiniĝo de la vasta intelekta junularo kun laboristoj kaj kamparanoj estas revolucia vojo montrita de Prezidanto Maŭ. Ni komprenas, ke ni klerigas nin nur por fari revolucion kaj pli bone servi al la popolo, sed ne por ĉasi specialistecon kaj famon, aŭ fariĝi burokrata moŝto. De la Granda Proleta Kultura Revolucio, pli ol ok milionoj da urbaj intelektaj gejunuloj de Ĉinio konkure iris al montregionoj kaj kamparo. Ili diris prave: “La

kamparo bezonas nin kaj ni pli bezonas la kamparon. En la kamparo troviĝas scioj nefinlerneblaj kaj aferoj nefinfareblaj. La kamparo estas vasta mondo, kie ni povas multon fari.” Mi terkulturas pli ol dek jarojn post mia reveno al la hejmloko kaj profunde komprenas ke oni povas vere transigi sian starpunkton al la flanko de laboristoj kaj kamparanoj kaj solvi deradike la problemon kiujn ami, kiujn malami kaj al kiuj servi, nur se ili longdaŭre kaj senkondiĉe vivas inter malriĉk kamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Oni povas akiri kapablon servi al malriĉk kamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj fariĝi novaj kamparanoj kun socialisma konscio kaj klereco, nur se ili persone partoprenas en la praktiko de la tri grandaj revoluciaj movadoj — klasa batalo, produkta batalo kaj scienca eksperimento — kaj reformas sian subjektivan mondon dum reformado de la objektiva mondo. Nun grandaj nombroj da intelektaj gejunuloj iras al montregionoj kaj kamparo por sinhardado, tio estas granda socialisma revolucio, radikala rompadon kun la putraj ideoj de ekspluataj klasoj ekzistantaj milojn da jaroj, forta kritiko al la konfucianismo kaj peza bato al imperiistoj, reviziistoj kaj reakciuloj.

Kial ĉiuj reprezentantoj de reakciaj regantaj klasoj en la historio energie opoziciis kontraŭ tio ke la intelektaj gejunuloj iru la vojon de kombiniĝo kun laboruloj? Ĉar ili staris ĉe la flanko de reakciaj regantaj klasoj kaj protektis la reakcian regadon. Pro tio ili volis ke junuloj malŝatu fizikan laboron kaj malestimu laborulojn. Konfucio, Mencio kaj similaj kriaĉis, ke “kiuj laboras intelekte, devas regi; kiuj laboras fizike, devas esti regataj”, kaj Lin Biaŭ kalumniis ke laboruloj zorgas nur havigi al si “oleon, salon, saŭcon, vinagron kaj brullignon”. Laŭ ilia opinio fizika laboro estas “malestiminda” kaj la laboruloj estas senindaj “plebanoj”, kvazaŭ



Intelektaj junuloj de Ŝigiaĝuang de Hebej aktive sin anoncis por iri en la kamparon, forte kritikante la absurdan tezon de Konfucio "fariĝi burokrato post sukcesa sinklerigo" per sia praktika agado.

nur ili, bando da "sanktuloj" kaj "geniuloj", estus "herooj" kreintaj la historion, kaj sen ili la terglobo ne plu rotacius. Tio estas malica kalumnio kontraŭ la vasta laboranta popolo kaj ekstreme reakcia sensencaĵo!

Kiuj vere kreis la historion de la homaro? Tiuj estis la sklavoj kaj popolamasoj, sed absolute ne tiu bando da vampiroj kaj parazitoj kiel Konfucio kaj Lin Biaŭ. Se la kamparanoj ne terkulturus, la "sanktuloj" suferus malsaton. Se la laboristoj ne konstruus domojn, la "geniuloj" ne havus loĝejojn. **"La plebaj estas la plej saĝaj! La aristokrataj estas la plej stultaj"**, tio estas ĝenerala vero.

La historio elokvente konstatis, ke **"La popolo, nur la popolo, estas la movforto kreanta la mondan historion"**. *La Internacio* diras prave:

*Ne la cezar', nek dia volo
La savon portos de l' tiran',
Liberon donos al popolo
Nur ĝia propra forta man'.*

. . .

Observante la instruojn de Prezidanto Maŭ pri sinapogo sur la propraj fortoj kaj lukto kontraŭ malfaciloj, la vasta laboranta popolo de nia lando estas kuraĝa tiel en penso kiel en ago, rompis superstiĉojn, liberigis sian penson, kaj ekspluatis Daking-olekampon, konstruis Nankinan Ponton super Jangzi-rivero, kreis bonan rekordon en grenproduktado en Daĝaj kaj lanĉis satelitojn... Kiu el tiuj gloraj sukcesoj ne estas gajnita de la laboranta popolo? Kiu granda atingo ne estas kristalo de ĝia diligenta laboro? Kombiniĝante kun laboristoj kaj kamparanoj, ni intelektaj gejunuloj batalas kontraŭ la naturo kaj kreas la belan estontecon. Pro tio ni sentas senkomparan gloron kaj fieron! Dum mia laborado kaj vivado en kamparo de pli ol dek jaroj, ĉiuj laboroj, ĉu fiŝkaptado sur glaciiginta rivero fare de ni virinoj, aŭ konstruado de kampoj, plibonigado de grundo, batalado kontraŭ naturaj katastrofoj, kaj scienca terkulturado fare de nia virina taĉmento "Hirundo" kune kun komunumanoj, profunde komprenigis al mi ke la materiaj riĉaĵoj estas kreitaj de la laboranta popolo, fizika laboro estas glora kaj brava ago kaj la laboranta popolo estas granda. La vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj havas klaran senton de amo kaj malamo, firman starpunkton kaj riĉan sperton, ili ĉiam estas por ni lernindaj modeloj.

Kombiniĝante kun malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, ni batalas kontraŭ la naturo, kontraŭ la klasaj malamikoj, kontraŭ la reviziisma linio kaj kontraŭ la malnovaj tradiciaj ideoj, kaj konstruas la novan socialisman kamparon. Tio estas granda afero en la estontaj centoj da jaroj por opozicii kaj eviti reviziismon, solidigi la diktaturon de la proletaro, konstrui socialismon kaj realigi komunismon. La intelektaj gejunuloj diris fiere: "Fizika laboro povas elfosi radikon de reviziismo kaj ŝvito povas forlavi egoismon." Fariĝi laborulo kun socialisma konscio kaj klereco estas nia alta deziro kaj konstrui socialismon kaj realigi komunismon estas nia granda idealo. Ni nepre devas firme kaj senŝanceliĝe iri antaŭen laŭ la direkto montrita de Prezidanto Maŭ kaj enradikiĝi en

NOVA PASAĜERA FERVOJA STACIO DE KANTONO

Kantono, kiel nodo de la fervojoj Pekina-Kantona, Kantona-Ŝenĝen-a kaj Kantona-Sanŝuj-a, estas movoplena. Diverslandaj geamikoj, elmigrintaj ĉinoj kaj samlandanoj el Hongkong kaj Aŭmen, kiuj partoprenas en la Ĉina Foiro de Eksportaj Varoj, tie el- kaj en-vagoniĝas. Por adaptiĝi al la bezono de persontrafiko,

nova fervoja pasaĝera stacio estis konstruita tie lastatempe.

La nova stacio situas ĉe Lihua-lago de Kantono kaj proksime al la Domo de la Ĉina Foiro de Eksportaj Varoj. La konstrua areo de la stacio estas ĉ. 40,000 kvadrataj metroj, t.e. 7-oblo de tiu de la malnova stacio. La kvar-etaĝa stacio havas 10 atendejojn por pasaĝeroj kaj 8 por eksterlandaj gastoj, kiuj povas samtempe teni pli ol 10,000 pasaĝerojn. La stacio havas 11 trakojn, 4 kajojn kaj 4 subterajn tunelojn. La moderne instalita stacio funkcias altefike, povas pli bone garantii sekuran kaj ĝustatempan alvenon de trajnoj kaj ankaŭ ĝiaj diversaj aranĝoj estas tre oportunaj al pasaĝeroj.



la kamparo kaj batali sur la fronto de la tri grandaj revoluciaj movadoj. Konfucio kun membroj mallaboremaj, kiu ne scipovis diferencigi la kvin grenojn, estis reprezentanto de ruiniĝinta sklavposedanta klaso, kaj Lin Biaŭ, kiu havis nenian veran scion, estis agento de bienuloj, kulakoj, kontraŭrevoluuloj, fiuloj, dekstruloj, imperiistoj, reviziistoj kaj reakciuloj, ambaŭ estas ĝismortaj malamikoj de ni

intelektaj gejunuloj. Ili kolportis la tezon “fariĝi burokrato post sukcesa sinklerigo” por korodi la revolucionan volon de ni, intelektaj gejunuloj, por ke ni fariĝu ilia obeema instrumento en restaŭro de kapitalismo kaj regreso. Tio estas ilia neniam realigebla fantazio! Ĉiuj reakciuloj kontraŭ la revolucia tajdo estos certe faligitaj de la popolo, tio estas senescepta leĝo en disvolviĝo de la historio.

Kritiko de Huang Ŝuaj kontraŭ la tezo de Konfucio pri “digno de instruisto”

HUANG ŜUAJ estis lernantino de la 5-a klaso de la Unua Elementa Lernejo de Ĝonguancun en Pekino. En sia taglibro destinita por prezenti al sia ĉefinstruisto, ŝi skribis: “Hodiaŭ iu el miaj kunlernantoj ne obeis la klasĉambrajn disciplinojn kaj faris ion nedecan. Tiam vi alvokis lin al vi kaj diris: ‘Mi eĉ volus frapi vin je la kapo per montrobastono.’ Via diro estas iom ne taŭga. La montrobastono estas uzata nur por instruado, sed ne por frapado al la kapo de lernantoj. Mi opinias, ke vi kritikis la lernantojn tro rigore, sed paciencan admonadon vi donas nesufiĉe. Ĉu frapi je la tablo kaj kolere direkti la rigardon al lernantoj povus solvi ideologian problemon? Mi esperas, ke vi estu pacienca en korektado de eraroj de lernantoj kaj gardu vin de maltaŭgaj paroloj.”

Ŝia ĉefinstruisto ne povis tuj akcepti ŝian kritikon kaj sentis ofendon kontraŭ sia digno; pro tio li instigis aliajn lernantojn riproĉi ŝin. Cetere la murgazeto aperigita de la klaso ankaŭ kritikis la taglibron de Huang Ŝuaj.

Huang Ŝuaj akre demandis: “Ĉu ni geknaboj en la epoko de Maŭ Zedong ankoraŭ devas esti sklavoj sub la ‘digno de instruisto’ de la malnova eduka sistemo?”

“Digno de instruisto” estas devenanta de pli ol 2,000 jaroj antaŭe, de la reakcia pensulo Konfucio, kiu obstine klopodadis por protekti sklavsistemon. Konfucio estis praavo, kiu antaŭenpuŝis ne nur reakcian politikan linion per edukado, sed ankaŭ reakcian edukan linion per la tezo pri “digno de instruisto”.

Konfucio rigardis la rilaton inter instruisto kaj lernantoj kiel tiun inter monarĥo kaj vasaloj, ĉar

instruistoj estas superaj dum lernantoj subaj kaj la subaj ne devas kompromiti la prestiĝon de la superuloj kaj la etiketon. Foje la predikado de Konfucio pri “sinregi por restarigi la etiketon” tedis lian disĉiplon Zajju kaj tiu simple fermis la okulojn por dormeti. Tio ofendis Konfucion kaj li insultis Zajju: “Li simple estas putra ŝtupo negravurebla, kaj muro el sterkaĵo nekalklebla!” Dume li tiel laŭdis sian plej ŝatatan disĉiplon Jenhuj: “Mi tuttage predikis al Jenhuj, kaj li neniam montris sin iel ajn kontraŭ mi.” Jen estas la esenco de “digno de instruisto” de Konfucio, ke li volis kulturi siajn disĉiplojn obeemaj al liaj reakciaj tezoj. Lia alia disĉiplo Ĵankiu partoprenis en revolucia agado kaj tuj suferis la kruelan atakon de Konfucio. Konfucio ne nur forpelis lin kaj ne agnoskis plu lin kiel sian disĉiplon, sed ankaŭ agitis siajn lojalajn disĉiplojn ĉirkaŭtaksi kontraŭ li.

La kritiko de Huang Ŝuaj kontraŭ “digno de instruisto” de Konfucio rilatas tion, kian edukan linion la lernejoj sekvu kaj kiajn lernantojn kulturu. Laŭ la revolucia eduka linio de Prezidanto Maŭ, oni devas kulturi la lernantojn en daŭrigantojn de la revolucia afero, kiuj kuraĝas persisti en la vero, havas la revolucionan spiriton kontraŭstari la tajdon kaj estas disvolvataj en siaj moralo, intelekto kaj korpo.

Huang Ŝuaj ja estas knabino kreskanta sub la edukado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ. Ŝia taglibro post publikigo en fragmentoj trovis varman laŭdon ĉe instruistoj kaj lernantoj de mezgradaj kaj elementaj lernejoj tra la lando. La eduka rondo de Ĉinio ne nur kritikis la tezon pri “digno de instruisto” sed ankaŭ kritikis ĉiuflanke



Huang Šuaj (la dua de dekstre en la fronto) kune kun siaj kunlernantoj kaj instruistino kritikis la reviziisman edukon linion.

la kontraŭrevolucionan restaŭran linion — “sinregi por restarigi la etiketon”, tezon de Konfucio energie predikitan de Lin Biaŭ.

Kritikante kontraŭ “digno de instruisto”, Huang Šuaj kaj milionoj da ĉinaj lernantoj ne rigardas instruistojn kiel siajn malamikojn, sed direktas la batalan lancpinton ĉiam kontraŭ Lin Biaŭ kaj konfucianismo. Du tagojn post la publikigo de la taglibro en ĵurnaloj, Huang Šuaj ricevis dekojn da leteroj adresitaj de diversaj rondoj. Ŝi transdonis la leterojn al sia ĉefinstruisto. Tiu diris: “Vi montru la leterojn al viaj kunbatalantoj.” Tiam Huang Šuaj diris: “Ankaŭ vi estas nia kunbatalanto.” La afero tre kortuŝis la instruiston. Li diris: “La junaj bravuloj bone komprenas la politikojn de la Partio kaj mi vere spertas ke revolucionaj instruistoj kaj lernantoj estas kunbatalantoj en la sama tranĉeo.” Post kelkaj tagoj la instruisto ricevis leteron de lernanto de iu elementa lernejo. La letero diras: “Instruisto de Huang Šuaj, de la taglibro de Huang Šuaj mi informiĝis, ke vi eraris, kaj esperas, ke vi vin korektu. La kritiko ne estas

direktata kontraŭ vi, sed kontraŭ reviziismo. Mi esperas, ke vi kaj Huang Šuaj unuiĝos por la revolucio.” La letero edukis ne nur la instruiston de Huang Šuaj, sed ankaŭ tiujn de aliaj lernejoj.

La instruisto diris: “La feŭda, kapitalisma kaj reviziisma tezo pri ‘digno de instruisto’ faris min kontraŭulo de la lernantoj, sed la revolucia linio de Prezidanto Maŭ kompakte kunigis min kun la junaj bravuloj.” Li esprimis, ke li neniam forgesos la lecionon elĉerpitan el la afero. Nun en la Unua Elementa Lernejo de Ĝongguangcun aperis nova revolucia fizionomio. Huang Šuaj laŭdis sian ĉefinstruiston: “Li jam fariĝis nia bona kunbatalanto, bona modelo kaj bona ‘estro’.” Iu instruisto, kiu iam antaŭe instruis la klason de Huang Šuaj, memkonscie venis al ŝia klaso por peti de la lernantoj kritikajn opiniojn. Li estis emociita ĝis la larmoj pro la varma akceptado de la lernantoj. Nun la klaso estas disciplinema kaj la kvalito de ĝia lernado senĉese altiĝis. Pro tio ĉiuj lernantoj de la klaso fariĝis ruĝgvardianoj diligente lernantaj kaj ĉiutage progresantaj.

Batalo ĉe Hiŝa-insularo



(Raporto en versoj)

III SPEKTAKLO DE BATAL' SUR MARO

*Trans ondmontetojn, sur ondogigantojn
militaj ŝipoj kuras distranĉante
mil pirajn florojn per la pruo, kaj trenante
per sia poŭpo mil arĝent-rubandojn.
Majesta l' l-a-aŭgusta flago
firtadas en la mara vento,
la ĉiam batalpretaj ĉef-kaj vic-kanonoj
ĉe l' ŝipekstremoj kaŭras tigre en atento;
kantadas laŭte la motoro,
turniĝas diligente l' okulego de radaro.
Antaŭen,
la juna mar-armeo de Ĉinio!
Antaŭen militŝipoj de la proletaro!*

*Ventego muĝas
kaj nuboj fuĝas,
tra ondfurioj
la militŝipoj en fleksebla formacio*

*puŝiĝas laŭ la ĝusta vojlinio.
Ŝipestro l' juna staras kontraŭ l' vento,
kiel giganta kokosarbo sub la firmamento.
De sub la kask' mil liojn fore tra nebulo
kapablas vidi liaj agl-okuloj.*

*Ŝipestro Ĝong Haj
naskiĝis apud Hiang-rivero
kaj ĉi junulon novĉinian nutris Ŝaŭŝanĉong¹
per suna brilo, pluvo kaj roseroj.
Ĉe Ŝangĉangvu-o² apud Lotuslago
fariĝis li junpionir' en iu tago,
kaj en l' antaŭa kamparan-lerneja domo,
kie laboris la gvidanto nia granda,
membroiĝis li al KJL³ la batalanta.
La ŝtormoj sur la maro
kaj l' viv' sur la ŝiparo
firmiĝis lian batalvolon,*

kaj donis al li ŝtalajn ostojn, bravan koron,
kaj dank' al lerno diligenta
pri l' ver' revolucia
li glorie iĝis membro de la Kompartio,
dividas ĝojon kaj malĝojon kun ĉiuj kvin kontinen-
toj.

Ŝipestro l' juna en tiu momento
kun tajda penstorento
kaj nobla sentimento
ekvidis sur la firmamento
ke ĉe Tian-anmen verdas pinoj, ruĝas muroj,
Ĝongnanhaj⁴ plenas je sunbrila puro,
Prezidanto Maŭ, nia granda gvidanto
rigardas al la ĉielrando,
montrante al ni l' vojon sur la maro,
nin helpas per kompasoj de l' revolucio
kaj kuraĝigas la armeon kaj popolon ĉiam marŝi
en batalo.

Rigardon sian jetas la ŝipestro
al bild' superba sur la kalendaro:
tumulte flugas nuboj tra l' ĉielo,
fortikaj pinoj en trankvilo staras,
pejzaĝo kun senlima belo
de l' alta Luŝan⁵ rave klaras.

.....
Ventblovo laŭtis,
li kvazaŭ aŭdis
sonoran voĉon
ree ŝvebantan ĉe l' oreloj:
"Tuj for de Hiŝa l' invadantojn pelu!
Revoluciaj armeanoj,

kompartianoj,
defendu per la vivo la linion de revoluci' de Pre-
zidanto Maŭ!"

Ho!
Jen klarion' aeron skuas,
tamburo forte bruas,
kaj "Kanto pri la socialisma patrio"
sonoras laŭte kun pasio!
por la soldatoj
signifas ja nenion
transpasi l' Sudan Ĉinan Maron
eĉ kunportante la Kunlun-montaron!

Preterpasinte Hjuande-insularon⁶
al Jongle l' ŝipoj rekte iris.
Aŭdiĝis plend' de fiŝistaro
kaj la ŝipistoj laŭte kriis:
"Jen kvar aliaj militŝipoj de l' saĵona puparmeoj
invadas ree nian maron!"

Tuj mobilizis la ŝipestro
kaj l' politika komisaro:
"La ĉin-popol' ne estas ofendebla!
La fiŝkaptistoj atencitaj volas helpon!
Ni ne deziras colon da fremdlanda tero
kaj absolute ne toleras teritori-perdon!"
"Ja ĉiam Hiŝa-insularo al ni apartenas
kaj tiun nedubeblan veron tuta l' mond' rekonas!"
"La fiŝkaptistojn firmdecide ni protekti penos,
kaj pro l' suvereneco ni eĉ vivon donos!"

Severe la lantern' signala
rigardon de averto foj-refoje jetis al la

militaj ŝipoj malamikaj;
la puparmeo en praktiko
barbare arogantis
— la ŝipoj ĝiaj ja pli grandis —
per ili frotis nian ŝipon ripetade,
sed per demono la ruzado
difektis nur parteton de la balustrado.

Pistolon sian la ŝipestr' eltiris,
indign' en la okuloj fulme brilis!
La mar-soldatoj kartoĉegojn jen ekprenis,
kaj kor' ilia je malamo plenis.
Per la indigna flamo de la soldataro
eĉ povus tuj ekbruli l' Suda Ĉina Maro!

Pistolon sian la ŝipestr' remetis
kaj la indignon premis kun skrupulo:
“Ni nepre ne ekpafu la unuaj!
Unuanime ni batalu kontraŭ la krimuloj.”

Niaj heroaj ŝipoj en aplomb' impetis,
dum timo kaj konfuz' la malamikojn regis:
savveŝton pupsoldatoj al si jam surmetis,
kaj fuĝi l' oficiroj kun savzono pretis,
iliaj ŝipoj ŝanĝis jen la formacion
kaj al haveno Da Nan ili sin direktis.
“Jen la pirataj ŝipoj fuĝas en konfuzo!”
“Ne!
nin bone gardu de ilia ruzo!”

“Apenaŭ Ĝong Haj finis sian diron,
la malamikoj jen returnis pruon sian,
post tiu ruza fuĝŝajnigo,
kruele ili fetis sin al niaj ŝipoj.

Ho, l' Suda Ĉina Maro,
memoru bone!

memoru la damnindajn krimojn de l' sajgona
banditaro!

Ho, l' Suda Ĉina Maro
ateston donu:

Sajgona puparme' atakis la unua per bombardo
al niaj ŝipoj kaj la insularo!

Ĝuste avida tiu banditaro

bruligis la fajregon de milit' invada!

**Ne atakite,
ni ne atakos;
sed atakite,**

ni nepre reatakos.

Netolereble! La popol' kaj soldataro
tuj faris memdefendan reatakon ĉe la insularo!

Ho!

La nuboj flamas sur ĉielo,
kaj kugloj flugas tra l' aero,
akvaj kolonoj saltas mite!
La ŝipoj niaj formacion formis,
antaŭen kuris plenrapide
tra l' kanonfajro danĝerspite!

Ekpafu!

Ton-ton-dro!

Ni venĝu la viktimaĵn popolanojn de Ĉini' kaj
Vjetnamio!

Ekpafu!

Ton-ton-dro!

Defendu ni teritorion de l' patrio!

Ekpafu!

*Alvenis jen la ŝip' de A Ŝa por helpado!
Ĝi lertis en kunago,
disigis la paffajrojn de la malamiko
kaj falĉis pupsoldatojn supre de l' ferdeko!*

Ekpafu!

*Imitu VPA⁷ en pun' de perfiduloj de l' nacio!
Antaŭen marŝu!
Profundas mare la batala amikeco inter la po-
poloj de Ĉini' kaj Vjetnamio.*

Pafadu! Plu antaŭen!

*L' obusoj de l' popolo ja okulojn havis
kaj ĉiuj ili ŝipojn malamikajn trafis!
Solida bato:
La ĉefan ŝipon kaptis flama incendio,
komand' plu ne efikis, ĉesis kun funkcio.
Solida bato:*

*La piratŝipoj perdis sian formacion
kaj ĉiu krom sin-savo zorgis jam nenion!
Solida bato:*

*Rulfalis la soldatoj
trafitaj sur ferdeko.
Kaj kie rifuĝejo?
La maro-abismego!*

*Nia ŝipar' batalis pli kaj pli bravege,
la ŝip' heroa luktis ĉiam en la fronto.
Ruĝiĝis kanontubo,
kugling' ŝveliĝis en respondo,
kaptiĝis firme en la tubo!
La komisaro haste tien iris,*

*etendis sian manon grandan kaj kalozan
kaj la kuglingon ardan tuj eltiris!
Senĉese ŝargis la kanonojn
la stimilitaj municiaj armeanoj.
Pro ardo de l' armiloj eĉ aperis
vezikoj sangaj sur iliaj manoj,
sed malgraŭ la doloro
defendis ili la patrimon per la tuta koro!*

Ho!

*Pro kio?
La Suda Ĉina Mar' ondegajn
jetadas al la hero-ŝip', sur la ferdekon!
Pro kio?
Jen kolektiĝis nuboj en la vasto
ĉirkaŭ la alta masto!
Angulo de l' heroa ŝipo jen ekbrulas
kaj flamoj en ventego saltas kaj murmuras!
Ĝong Haj ordonis: "Tuj estingu, kamaradoj!"
Sentime jetis sin antaŭen la soldatoj!
Ne gravas ke l' pikado
de fum' malhelpis la rigardon!
Ne gravas ke brulaĵo
ruliĝis en la ĉirkaŭaĵo!
"Rapidu!
Estingu
per nia viv' en spito!
Rapidu!
Estingu
per nia sang' kaj ŝvito!"
La marsoldatoj
deziris superverŝi l' fajron rekte per la maro
por fari finon tuj al la surŝipa fajro.*

*Dum la soldatoj fajrestingi penis,
jen en la fronto malamika ŝip' numero 10 alvenis!*

Ŝipestro Ĝong Haj

la kaskon tiris

kaj li ŝvingante l' pugnon diris:

“He, kamaradoj!

La fajro nin ne ĝenu,

la malamikan ŝipon nepre ni subpremu!

Per obstinec' kaj persistemo

la malkuraĝajn ni superu!

Renkonte al ĝi!

Ataku en proksimo!

Ke ne efiku plene ĝia armilaro!

Ni venku ĝin per avantaĝ' en miksbatalo!”

Ni estas ja armeo proletara

kun avantaĝo eksterordinara:

kaj malfacil' kaj morto ankaŭ

estas por ni nenio,

kun la popolo ni ligiĝas kiel karn' kaj sango.

Ja dank' al tio

ni movis for la tri montegojn⁸,

ja dank' al tio

rezistis ni kontraŭ Uson' kaj helpis Koreion,

ja dank' al tio

ni gloran venkon gajnis ĉe l' Ĝenbaŭ-insulo⁹,

ja dank' al tio

defendas ni la mar-teritorion.

Batalo brulis,

la ŝip' heroa kuris al provad' de malfacilo,

kaj sur la voj' de sturmo

paneis l' elektron-stirilo!

“Ja neŝanĝeblas nia plan' de malamik-ekstermo;

ju pli da malfacil', des pli da decidemo!”

Ordonis Ĝong Haj:

“Tuj funkciigu l' man-stirilon!”

“Jes!”

Kvin mar-soldatoj brave tuj elpaŝis

kaj senprokraste levis la stirej-tegilon.

Malsupren ili kuris fulme en la holdon

kaj l' man-stirilon turnis ili en konkordo,

direktis per ĝi vastan la senliman maron,

luktante kontraŭ l' onda ŝanĝiĝema hordo!

Ŝipestro Ĝong Haj staris

sur la podi' komanda,

urĝante al batalo,

samkiel mont' giganta!

Ho, vento kaj ondegoj

ludadis kune grandiozan pecon de batalmuziko!

La mar-soldatoj per huraoj skuis la aeron.

“Antaŭen!

kun volo de la pin' fortika

kaj ĝia kuraĝego.

Antaŭen!

Por gajni venkon de revolucio

necesas grimpi al montpinto de danĝero!

Antaŭen!

La sturma vojo

direktas sin en ŝtormo kaj ondegoj!

Antaŭen!

Antaŭen!

An — ta — ŭen!”

La ŝip' heroa, kvazaŭ fajra drako

tuj proksimiĝis al la ŝipo malamika!

Kaj Ĝong Haj kriis laŭte:

“Tuj jetu mangrenadojn!”

La meĉon li ektiris, ŝvingis brakon —

kaj mangrenado trafis la piratojn!
Pum!
Preskaŭ disfalis la pirata komandej-podio
kaj ĝin sieĝis forta fum-legio!
Sekvante la ŝipestron ĉiuj mar-soldatoj
atakis malamikojn tuj per mangrenadoj!
Fajfante ili flugis,
ekplodis, semis morton,
ĉe l' pruo kaj la poŭp' de l' malamika ŝipo,
detruis la tribordon kiel la babordon!
Pro l' eksplodado
mutiĝis la kanonoj,
rompiĝis la ŝipmasto,
mil truoj traboriĝis, flugis fer-ĉifonoj!
La oficiroj kaj soldatoj
de l' banditar', simile al brogataj ratoj,
konfuzo kuris interpuŝe en la holdon.
La turpa flago de Sud-Vjetnamio
ŝvebante falis en ondegajn kiel korvo
mortinta en la flam' kaj fum' de l' incendio.

Rigardu!
Tri forte difektitaj pirat-ŝipoj fuĝis
kun kliniĝanta flank' kaj vosto de fumnubo.
Numero 10 rapide al marfund' rifuĝis,
ke al la Suda Ĉina Maro aldoniĝis rubo!
Sajgonaj frenezuloj ja pri venko revis,
sed fortan punon justan je la fin' ricevis!
La ŝip' heroo venkis ankaŭ l' incendion,
kaj bone ĝi riparigis l' elektron-stirilon,
batalaj pozicioj restis sendifekte,
glore triumfis ĝi perfekte.

Hurau, ondoj grandaj!
Ŝtormbirdoj laŭte kantu!

Vi kantu pri l' miraklo de l' bravuloj sur la mar'
de l' patrolando,
pri l' venko de l' 30-minuta memdefendo sonu
via kanto!
La mararme' de l' nova Ĉinio uzis ja nek "Komar-
klasan kanonŝipojn",
nek "Stiks-misilojn ŝip-al-ŝipajn".

Sed ni batalis
per etaj kontraŭ grandaj,
per feblaj kontraŭ fortaj,
en simpla forto-montro de l' popola mar-armeo
malgloron plenan trafis jam la mastro kaj lakeo!

Hurau, ondoj grandaj!
Ŝtormbirdoj laŭte kantu!

Vi kantu pri l' miraklo de l' bravuloj sur la mar'
de l' patrolando,
pri l' venko de l' 30-minuta memdefendo sonu
via kanto!
La mararme' popola, kiun Prezidanto Maŭ mem
kreis kaj komandas,
elmontris kuraĝegon en la miksbatalo,
per mangrenadoj atakante malamikan ŝipon
kaj en la histori' de popola milito sur la maro
starigis vere novan mirindegan tipon.

(ĉaŭrigota)

1 Ŝaŭŝanĉong: Hejmloko de Prezidanto Maŭ, la granda gvidanto de la ĉina popolo, en Hiangtan-gubernio de Hunan-provinco.

2 Ŝangĉangvu: Naskiĝloko de Prezidanto Maŭ en Ŝaŭŝanĉong.

3 KJL: Mallongigo de la Komunisma Junulara Ligo.

4 Ĝongnanhaj: Loko en Pekino kie loĝas Prezidanto Maŭ.

5 "Pejzaĝo kun senlima belo de l' alta Luŝan" aludas faman foton faritan de kamaradino Li Gin "La Feo-kaverno de Luŝan", por kiu Prezidanto Maŭ verkis jenajn brilajn versojn:

*Fortikaj pinoj staras jen en gazo de vespero,
Trankvilas ili, dum nubaro flugas en pelmelo.*

*Naturo kreis artoplene la Feo-kavernon,
Sur la montpintoj de danĝero sorĉas rava belo.*

6 Hjuande kaj Jongle estas insularoj apartenantaj al nia Hiŝa-insularo.

7 VPA: mallongigo de la Vjetnama Popola Armeo.

8 Tri montegoj signifas fortojn de imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo subpremantaj la ĉinan popolon en la malnova socio.

9 Ĝenbaŭ-insulo: Ĉina insulo de antikveco en Hejlonggiang-provinco. En marto de 1969 niaj armeo kaj popolo rebatis tie la freneze invadantajn sovetuniajn trupojn.





Inter Amikoj

Ondoj de amikeco

Savi Kunbatalantojn en Jalu-rivero

La 18-an de februaro de 1974, la Centra Popola Komitato de la Demokratia Popola Respubliko de Koreio publikigis dekreton subskribitan de Prezidanto Kim Il Sen, por honori Ŝipestron Zang Bong Hien kaj ŝipanojn Li Hak Mun, Li Cen Jeng, Zo Tie Sang, Cue Ĝim Suk de pasaĝera ŝipo "Min Hing N-ro 437" de la Jalu-rivera Transporta Oficejo de Koreio per respublikaj ordenoj kaj medaloj pro ilia nobla proletara internaciisma spirito montrita en savado de ĉinaj fiŝistoj en uragano.

Iutage en majo de 1973, pasaĝera ŝipo "Min Hing N-ro 437" plena de pasaĝeroj ekveturis de urbo Hinjizu ĉe la landlimo de Koreio al Zudan-insulo ĉe la buŝo de Jalu-rivero. Subite, komenciĝis uragano kaj pluvego, leviĝis gigantaj ondoj sur la rivero. Ĝuste tiam, la pasaĝera ŝipo trovis ke en la ruliĝanta rivero flosas iu ĉina fiŝŝipo renversita kaj la fiŝistoj estas forportataj de torento malproksimen. Ĝi estas la fiŝŝipo Liaŭdong N-ro 8 de Anmin-a fiŝkapta grupo de urbo Dandong de Ĉinio. Vidinte tion, la ŝipanoj de Koreio tre maltrankviliĝis. Ili klare sciis, ke estas danĝere por pasaĝera ŝipo savi alian ŝipon en furiozaj ondegoj. Sed, ili ne konsideris pri sia sekuro kaj decidis savi la ĉinajn fratojn.

Maljuna ŝipestro Zang Bong Hien, kiu havas sperton pri navigado dum pli ol 30 jaroj, persone stiris la ŝipon kaj rapide kondukis la ŝipon al la renversita ŝipo. Ŝipanoj ĵetis en la riveron savzonojn kaj ŝnurojn al la ĉinaj fiŝistoj, sed ili jam ne havis forton por kapti ilin pro longtempa batalado kontraŭ ondegoj. "Malrapidu!" "haltu!" "regresu!" aŭdiĝis la ordonoj el la stirejo. La ŝipo iom post iom proksimiĝis al kvar ĉinaj fiŝistoj kaj koreaj ŝipanoj ilin savis per rapidaj movoj. Kiam la korea ŝipo devis foriri, la ŝipanoj sciis de ĉina fiŝisto, ke la ŝipestro de Liaŭdong N-ro 8 estas en la holdo

de la renversita ŝipo. Tial la pasaĝera ŝipo refoje proksimiĝis al la ŝipo. Kvankam la ŝipanoj sciis ke certe okazos granda akcidento, se helico de la pasaĝera ŝipo estos implikita de fiŝreto, tamen ili timis nenian danĝeron por savi la ĉinan fiŝiston. Kiam la pasaĝera ŝipo proksimiĝis al la fiŝkapta ŝipo, Li Hak Mun, ferdekestro kun hakilo je la talio, saltis sur la ventron de la renversita ŝipo. Ĉar la tuta ŝipventro estis plena de musko, li saltis sur ĝin kaj tuj glitfalis en la riveron. Tiam venis al lia cerbo la penso oferi sin por savi la ĉinan kunbatalanton. Li streĉis energion kaj grimpis sur la ŝipventron. Ankaŭ la ĉefmaŝinisto de la pasaĝera ŝipo kaj ĉina fiŝisto saltis sur la ŝipventron. Ili rapide faris truon en la ŝipventro kaj savis la ĉinan ŝipestron svenintan.

La ĉinaj fiŝistoj rapide resaniĝis post kuracado kaj ripozado en Hinjizu de Koreio. En la tago, kiam ili devis reveni al sia patrolando, sur la doko de Hinjizu de Koreio la kunbatalantoj de Koreio kaj Ĉinio foje kaj refoje manpremis kaj brakumis unu al alia. Sonis tra la doko krioj "Vivu Prezidanto Kim Il Sen!" "Vivu Prezidanto Maŭ!" "Vivu la amikeco de Koreio kaj Ĉinio!"

Savi Amikojn el Danĝero

Posttagmeze de la 14-a de aŭgusto, 1973, junaj fiŝistoj K. H. Sirisena, M. G. Piyasena kaj P. M. Piyadasa de iu vilaĝo de suda apudmara regiono de Siri-Lankao ascendis sian ŝipon "Piyadasa" kaj ekveturis por kapti fiŝojn. "Piyadasa" estas malgranda kvin-tonela fiŝkapta ŝipo en malprofunda maro. Je la deka de vespero, ĝuste kiam ili retiris reton, subite maŝino paneis ...

Matene de la sekvanta tago, familianoj de la fiŝistoj venis al la marbordo kiel kutime por atendi ilin. Sed "Piyadasa" ne revenis kaj la familianoj


de la tri fiŝistoj kun larmoj atendis kaj atendadis sur la marbordo. Unu, du, tri, kvar tagoj forpasis. La ŝipoj serĉantaj ĝin ĉiu revenis kun malespero.

Post kiam la ŝipo Piyadasa perdis sian funkcion, ĝi forpuŝiĝis de ondegoj. Sciinte, ke ilia ŝipo ne povas reveni hejmen, ili hisis tri ŝalojn kiel signalon de urĝsavo kaj ŝvingis brakojn al aliaj ŝipoj por peti helpon.

La kvar tagoj sur la maro estis tre malfacilaj por la tri junaj fiŝistoj. Tiam al ili restis nur kvar galjonoj da dolĉa akvo kaj kvin kokosoj. La maro forte balancis la ŝipon. Nokte frosta vento pikis ilin, kaj tage varmego bakis ilin. En la kvara tago, tute elĉerpiĝinte, ili pensis en si: “Ĉu ni saviĝos?” Matene de la 19-a de aŭgusto, ili trovis ke iu ŝipo veturis de malproksime. Sirisena stariĝis kaj ŝvingis brakojn kiel antaŭe. La ŝipo reduktis sian rapidecon kaj sin turnis al la fiŝkapta ŝipo. “Ha! ni saviĝos!” li ĝoje kriis kaj vokis siajn tute elĉerpiĝintajn kolegojn.

La ŝipo estas varŝipo “Vuhi” de Ĉinio. Ĝi proksimiĝis al la fiŝkapta ŝipo kaj metis ŝtupetaron. Kelkaj ĉinoj unue kunligis la fiŝkaptan ŝipon kaj poste venigis la fiŝistojn sur la varŝipon. La ŝipestro tuj konsolis ilin, ankaŭ kuracisto de la ŝipo venis por ekzameni ilin, kuiristo preparis bongustajn manĝaĵojn por ili. La kompleza zorgado kaj flegado de ĉinaj amikoj kortuŝis la tri fiŝistojn ĝis larmoj. Post kiam ili reakiris sian forton, la ŝipestro ordonis, ke la varŝipo sendu ilin al la hejmo laŭ ilia montrita linio sur la mapo.

Du serĉantaj ŝipoj de la vilaĝo tuj rekonis la ŝipon Piyadasa apud la varŝipo. La ĉinaj maristoj invitis ilin sur la varŝipon. Sciinte, ke la tri fiŝistoj estis savitaj de la ĉina varŝipo, ili fojerefoje esprimis sian koran dankon al la ĉinaj amikoj kaj samtempe petis la lastajn gastojn en sia vilaĝo. Pro urĝa transporta tasko, la ĉinaj amikoj afable rifuzis ilian inviton. Ili varme manprenis kaj adiaŭis la ĉinajn amikojn kun larmoj en okuloj.



TUTLANDA INDIVIDUA HALTERLEVA KONKURSO

La nomita konkurso okazis en Ŝanhajo en aprilo de la kuranta jaro. La pli ol 200 sportistoj venintaj el 20 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de la lando plejparte estis novicoj aperintaj en la lastaj du jaroj.

Dum la konkursado, sep sportistoj rompis ses tutlandajn rekordojn de plenaĝula grupo. Ekzemple, Vang Guohiong atingis

93 kg. en ŝiro, 115 kg. en etendo kaj lia totala atingo estis 207.5 kg.; Deng Jumin atingis 113.5 kg. en etendo; Jang Liuhan atingis 115 kg. en etendo kaj lia totala atingo estis 205 kg.; Ĝeng Gang atingis 120 kg. en etendo kaj lia totala atingo estis 207.5 kg. Per siaj atingoj ili rompis la tutlandajn rekordojn respektive de ŝiro, etendo kaj totala atingo en la suba plej malpeza kategorio. Deng Guojing rompis la tutlandan rekordon de la malpeza kategorio kreitan de li mem per 123.5 kg. en ŝiro. Liu Juehong kaj Miaŭ Guoŝeng rompis tutlandajn rekordojn de meza kategorio respektive en ŝiro kaj etendo per 130.5 kg. kaj 166.5 kg. Kaj krome ankaŭ 45 junaj sportistoj rompis 16 tutlandajn rekordojn de junula grupo.



Ĉinaj Naciecoj

Gaŭŝan-nacieco

de ZONGMIN

TAJVAN-PROVINCO deantikve estas nedisi-gebla parto de la sankta teritorio de Ĉinio. Gaŭŝan-nacieco de Tajvan estas unu el la membroj de la multnacieca familio de Ĉinio. Same kiel la aliaj naciecoj ĝi faris siajn kontribuojn en kreado de la historio kaj kulturo de nia granda patrolando per sia diligenta laboro.

Gaŭŝan-nacieco de Tajvan, kun ĉirkaŭ 200,000 membroj, ĉefe loĝas en la montregionoj kaj la apudmaraj valaj ebenaĵoj de la orienta parto de Tajvan kaj sur Lan-ju-insulo, kiuj okupas 45% de la totala areo de la tuta provinco.

La gaŭŝan-a popolo kun tradicio de glora patriota batalo varme amas sian patrolandon kaj faris senĉese bravan batalon kontraŭ agresadoj de eksterlandaj imperiistoj, kune kun la han-a popolo de Tajvan. Ĝia batalado estas parto de la kontraŭimperiismaj bataladoj de niaj diversnaciecaj popoloj. Frue, en la jaro 1593, agresante Koreion, Tojotomi Hidejoŝi, ĉefo de la japanaj militaristoj, sendis liajn lakeojn al Tajvan por devigi gaŭŝan-an popolon kapitulaci kaj omaĝi al Japanio, sed ricevis firman oponon de la gaŭŝan-a popolo. En la jaro 1616, japanaj banditoj faris grandskalan militon kontraŭ Tajvan kaj terure fiaskis pro firma rezisto de la gaŭŝan-a kaj han-a popoloj. La gaŭŝan-a kaj han-a popoloj akiris la unuan venkon en komuna batalo kontraŭ japanaj agresantoj kaj defendis la sekurecon de patrolanda teritorio.

Post la 16-a jarcento, eksterlandaj koloniistoj unu post alia invadis Azion kaj nian landon. En la jaroj 1603 kaj 1622, nederlandaj koloniistoj dufoje okupis Penghu-insularon de nia lando kaj dufoje estis forpelitaj de la registara armeo de Ming-dinastio. Sed post tio nederlandaj agresantoj okupis Tajvan-insulon kaj ankaŭ hispanaj agresantoj surtretis Tajvan. Dum okupado de la nederlandaj kaj hispanaj agresantoj, la gaŭŝan-a kaj han-a popoloj de Tajvan faris rezistadon senhalte ĝis la

jaro 1661, kiam Ĝeng Ĉenggong radikale venkis la koloniisman armeon kaj reprenis la sanktan teritorion Tajvan.

En la historio de la brava kontraŭimperiisma kaj patriota batalo de Gaŭŝan-nacieco la plej famaj okazaĵoj estis la kontraŭjapana insurekcio en Vuŝe, oktobre de 1930 kaj la insurekcio en la 28-a de februaro de 1947 por oponi kontraŭ la okupo de la usona imperiismo kaj la reakcia regado de Ĉiang Kajŝek.

En la jaro 1894, sub la rekta subteno de Usono, la japana imperiismo provokis militon kontraŭ Ĉinio. La putra registaro de King-dinastio fiaskis kaj estis devigita subskribi naciperfidan humiligan Bakan(Ŝimonoseki)-kontrakton, kiu difinis ke Ĉinio devis omaĝi Tajvan kaj la apudajn insulojn al Japanio

La tajvan-a popolo neniam volontis fariĝi senpatriulo kaj brave rezistis per armiloj kontraŭ la japanaj agresantoj. Ili mortigis kaj vundis pli ol 32,000 japanajn banditojn inkluzive princon Joŝihisa, komandanton de la japanaj agresantoj.

De okupo ĝis kapitulaco en la jaro 1945, la japanaj imperiistoj faris en Tajvan kruelan koloniisman regadon de 50 jaroj, dum la heroa nesubigebla tajvan-a popolo faris obstinan batalon de duonjarcento kontraŭ la japanaj agresantoj por reveni en la sinon de la patrolando.

En oktobro de 1930, sub la influado kaj helpado de la han-a popolo, la gaŭŝan-aj popolanoj de Vuŝe faris insurekcion okaze de sportkunveno de la publika lernejo de Vuŝe. La ribelantoj mortigis japanan gubernatoron de Nenggaŭ kaj ĉiujn liajn subulojn kiuj partoprenis en la sportkunveno. Poste ili sieĝis la japanan politikan oficejon regantan Vuŝe, la loĝejojn de la oficistoj kaj mortigis pli ol 130 japanajn agresantojn, kiuj faris ĉiajn malbonojn kaj kruele mortigis gaŭŝan-ajn popolanojn.

La ribelantoj okupis Vuŝe-regionon tri tagojn. Informiĝinte pri tio, la kompartia organizo en Tajvan tuj decidis konduki diversnaciecajn popolanojn de Tajvan al batalo kontraŭ japanaj agresantoj kaj subteni la insurekcion de Vuŝe-aj popolanoj. La ĵurnaloj de Tajvan speciale eldonis eksterordinaran informilon pri la insurekcio kaj pro tio la japanaj agresantoj ege konsterniĝis. Je la 29-a de oktobro, la japanaj diabloj mobilizis grandan nombron da militistoj kaj armitaj policianoj por ĉirkaŭataki Vuŝe kaj kanonadis la pozicion de la gaŭŝan-aj popolanoj. Mortiginte grandnombrajn malamikojn, la insurekcia armeo de la gaŭŝan-aj popolanoj sin retiris en profundajn montojn, por rezisti utiligante naturajn danĝerlokojn. Tute senefikis la malamikaj kanonoj kaj militĉaroj. La malamikoj ekuzis aeroplanojn kaj dense bombardis kaj ŝutis grandan kvanton da gasbomboj, sed la gaŭŝan-aj popolanoj sentime rezistis ignorante mortan danĝeron. Multaj insurekciantoj, maljunuloj, malfortuloj, virinoj kaj infanoj mortis pro la venengaso en la valoj, tamen la restantaj daŭre rezistis ĝis la fino.

Je la 13-a de septembro de 1945, Japanio kapitulacis senkondiĉe kaj Tajvan denove revenis en la sinon de la patrolando. Sed, post nelonge la Tajvan-aj popolanoj denove suferis subpremadon kaj ekspluatadon de la usona imperiismo kaj Ĉiang Kajŝek-kliko. En la komenco de 1946, instigate

de la usona imperiismo, Ĉiang Kajŝek-kliko atakis la liberigitajn regionojn kaj levis kontraŭpopolan enlandan militon. Je la 28-a de februaro de 1947, por protesti kontraŭ diversaj agresaj agadoj de la usona imperiismo, la tajvan-a popolo levis grandskalan insurekcion kaj la batalaj sloganoj “proteston kontraŭ la agreso de la usona imperiismo”, “for la usonajn armeojn el Ĉinio” sonis tra la Tajvan-insulo kaj la apudaj insuloj.

Dum la insurekcio de la 28-a de februaro, ankaŭ la gaŭŝan-aj popolanoj de Tajbej, Tajĝong, Giaĵi, Gaŭhiong, Hualian kaj Tajdong prenis armilojn kaj rekte partoprenis en batalado. En multaj lokoj kune kun han-aj insurekciaj popolanoj ili okupis registarajn oficejojn, ekstermis reakciajn trupojn, per tio peze batis la usonajn agresantojn kaj malstabiligis la reakcian regadon de Ĉiang Kajŝek-kliko.

La insurekcio de la 28-a de februaro montris firman decidon kaj fortan deziron de la gaŭŝan-aj kaj alinaciecaj popolanoj de Tajvan. Kvankam la insurekcio estis subpremita, tamen pli profundiĝis la brava batalo de la gaŭŝan-a kaj alinaciecaj popolanoj kiuj amas la patrolandon, oponas kontraŭ la usona imperiismo kaj klopodas por reunuigi la patrion.

Gaŭŝan-nacieco de Tajvan havas sian propran lingvon, sed ne skriban lingvon. Laŭ la moderna arkeologio, multaj materialoj atestis ke gaŭŝan-



Tri gaŭŝan-oj (en la fronto)



*Gaŭŝan-a danco
"Sopiro al sampa-
trujanoj en Tajvan"*

nacieco devenis de la apudmaraj regionoj de la sudorienta parto de la patrolanda ĉefteritorio. Precipe en Tang-, Song- kaj Juan-dinastioj la popolanoj loĝantaj en la apudmaraj regionoj de la Fugian-kaj Guangdong-provincoj unuj post aliaj transloĝiĝis al Tajvan kaj starigis sangan rilaton kun la gaŭŝan-aj popolanoj de Tajvan.

Deantikve gaŭŝan-nacieco sin okupas pri agrikulturo, ĉasado kaj fiŝkaptado. Ili kulturis rizon, milion, kolokasion, bataton, maizon k.a. La ĉasado estas kolektiva kaj farata de viroj. Kun senĉesa invado de kapitalismo al Ĉinio, senĉese ŝanĝiĝas la ekonomia strukturo kaj klasa rilato de gaŭŝan-nacieco. Nun la gaŭŝan-aj popolanoj ankoraŭ troviĝas en duonkolonia kaj duonfeŭda stato kaj suferas de subpremado kaj ekspluatado de imperiistoj kaj feŭdaj kompradoroj.

Gaŭŝan-nacieco havas riĉan parolan literaturon kaj ĝiaj popolanoj ŝatas dancadon kaj ludadon de muzikiloj. Same kiel la aliaj naciecoj de la patrolando, la gaŭŝan-a popolo estas kreiva en gravurado kaj pentrado de homoj, animaloj, floroj kaj desegnaĵoj sur boteloj, kruĉoj, vazoj, bovloj, pipoj, glavingoj, linteloj kaj fostoj. La virinoj ne nur lertas en teksado de buntaj kretonoj, sed ankaŭ en brodado. Iliak jakoj, jupeoj kaj kaptukoj estas broditaj kaj la koloroj helaj.

Sub la intima zorgo de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ Zedong kaj la brila lumo de la nacia politiko de la Partio, la gaŭŝan-aj popolanoj loĝantaj en la ĉefteritorio jam fariĝis mastroj de la ŝtato kaj ĝuas nacian egalrajton. Je la 1-a de oktobro de 1949, kiam la Ĉina Popola Respubliko fondiĝis, reprezentantoj de la gaŭŝan-a popolo ĉeestis la celebran ceremonion por la fondiĝo. Ĉiu tutlan-

da popola kongreso havas reprezentantojn de gaŭŝan-nacieco. En la tutlanda komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco kaj la diversnivela ŝtataj organoj troviĝas gaŭŝan-naciecaj reprezentantoj. La gaŭŝan-aj popolanoj loĝantaj en la ĉefteritorio de la patrolando ĉiuj havas siajn profesiojn, povas viziti lernejojn, vivas feliĉe kaj ĝoje, kaj ĉiuj kontribuas sian forton al la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de la patrolando.

Tajvan estas provinco liberigota kaj gaŭŝan-nacieco estas unika emancipota nacieco de nia lando. Ili nun ankoraŭ suferas de subpremado, ekspluatado kaj diskriminacio kaj vivas en abismo de mizero. Ili kore sopiras al la socialisma patrolando kaj deziras fruan liberigon por partopreni en socialisma konstruado kune kun la aliaj naciecoj. La granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ, la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj diversnaciecaj popoloj tre simpatias la gaŭŝan-ajn popolanojn de Tajvan vivantajn en mizero kaj tre zorgas ilian liberigon. Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj montris en la politika raporto al la Deka Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio: "La samlandanoj en Tajvan havos brilan perspektivon nur post kiam ili revenos al la sino de la patrolando. Tajvan nepre devas esti liberigita. Nia granda patrolando nepre devas esti unuigita. Tio estas la komuna aspiro kaj sankta devo de la popolanoj de ĉiuj naciecoj de la tuta lando, inkluzive de la samlandanoj en Tajvan."

Tajvan-provinco estas sankta teritorio de nia patrolando, kaj la popolanoj en Tajvan estas niaj samsangaj fratoj. Ni nepre liberigos Tajvan por fine unuigi la patrolandon. Tio estas nerezistebla por ĉiu ajn imperiismo kaj ĉiu ajn reakcia forto.



Ĉina Geografio

La Lagoj de Ĉinio

EN Ĉinio troviĝas multaj lagoj, el kiuj pli ol 130 havas respektive areon de pli ol 100 kvadrataj kilometroj.

ILIA DISLOKIĜO

Ĉiuj provincoj kaj aŭtonomaj regionoj de Ĉinio havas lagojn, precipe plej multaj el kiuj koncentriĝas en la baseno de la meza kaj malsupra partoj de Jangzi-rivero kaj la Kinghaj-Tibeta Altebenaĵo.

Laŭ la karaktero de la lagoj kaj kun la linio de la suda parto de la Granda Hing-an-montaro, Jinŝan-montaro kaj la orienta parto de Kilian-montaro ĝis Ganggardesi-montaro kiel limo, la nordokcidento de la linio estas regiono de landinternaj, plejparte salaj lagoj kies akvo ne povas flui eksteren kaj entenas abundajn salojn, alkalon kaj aliajn materialojn por kemia industrio; ĝia sudoriento estas regiono de lagoj eksteren fluantaj, plejparte dolĉakvaj, kies abunda akvo favoras al navigado, irigaciado kaj dolĉakva bredado kaj iuj el la lagoj servas eĉ kiel superaj lokoj por ripozado kaj ekskurso.

LA ĈEFAJ DOLĈAKVAJ LAGOJ


Pojang-lago kiel la plej granda dolĉakva lago de Ĉinio situas sude de Jangzi-rivero, en la norda parto de Gianghi-provinco, kun areo de ĉ. 4,000 kvadrataj kilometroj. Ĝi akceptas al si akvon de la ĉefaj riveroj en Gianghi kaj ili formis radian akvosistemon. La akvo de la lago fluas preter Hukoŭ en Jangzi-riveron. Kiam la riveroj ŝveliĝas, la lago povas konservi portempe la superakvon kaj redukti la minacon al Jangzi-rivero. La lago produktas famajn specojn de fiŝoj, kiel mandarina fiŝo, engraŭlo, arĝenta fiŝo (*Protosalanx hyalocranius*) k.a. La loko estas varmeta kaj pluvoza, la apudlaga ebenaĵo estas fekunda kaj riĉa je produkto de rizo, sojfabo, juto kaj tritiko.

Dongting-lago situanta sude de Jangzi-rivero, en la norda parto de Hunan-provinco, kaj kun areo de pli ol 3,000 kvadrataj kilometroj, estas la dua granda dolĉakva lago de Ĉinio. En la antikveco ĝi estis parto de la vastega lago Junmengze. La lago poste estis ŝtopita de aluvio kaj dispeciĝis en multajn partojn, el kiuj la plej granda estas la nuna Dongting-lago.

Sude kaj okcidente de Dongting-lago enfluas la kvar riveroj Hianggiang, Ziŝuj, Juangiang kaj Liŝuj. La akvo de Jangzi-rivero fluas en la lagon en ĝia norda parto kaj revenas en Jangzi-riveron preter Ĉenglinggi. Pro sedimentiĝo de la grandkvanta sablo alportita de Jangzi kaj la aliaj 4 riveroj en la lagon, kaj pro la senplana polderigado de bienuloj kaj burokratoj antaŭ la Liberiĝo, la lago pli kaj pli malprofundiĝis kaj ĝia surfaco pli kaj pli malvastiĝis, tiel ke la bordaj loĝantoj ofte suferegis de inundo, kiam Jangzi kaj la aliaj 4 riveroj samtempe ŝveliĝis.

Post la Liberiĝo, dank' al la zorgo de la ŝtato, la popolo de la regiono reordigis la parton ofte inunditan de Jangzi-rivero inter Ĝigiang (de Hubej-provinco) kaj Ĉenglinggi (de Hunan-provinco) kaj apudlagajn kampojn, finis la diluvdividan konstruaĵon de Ginggiang, riparitis digojn kaj dragis riverujojn, pretigis multajn diluvokonservejojn kaj kultivejojn, kaj konstruis elektrajn pumpstaciojn. Dank' al tiuj aranĝoj la fizionomio de la lago multe ŝanĝiĝis kaj la agrikulturo tie akiris sinsekvajn abundajn rikoltojn.

La klimato ĉe la lago Dongting estas varmeta kaj pluvo tie abundas. La apudlagaj kampoj estas ebenaj kaj grasaj, tial ili abunde produktas rizon kaj kotonon. Kaj cetere la lago produktas diversajn fiŝojn kaj estas tre oportuna por navigado.



La lagoj de Ĉinio

Hongze-lago situas en la okcidenta parto de Giangsu-provinco kaj havas areon de 2,500 kvadrataj kilometroj. Ĝi estas la tria granda dolĉakva lago de Ĉinio.

La fundo de la lago estas pli alta ol la ternivelo kaj la egalmezura profundeco estas malpli ol 4 metroj. Huajhe-rivero estas la plej granda inter la riveroj fluantaj en la lagon. Plejparto de la akvo de la lago fluas en Jangzi-riveron kaj la cetera fluas en la Flavan Maron tra la Ĝenerala Irigacia Kanalo de Norda Giangsu. La ebenaĵo ĉirkaŭ la lago produktas rizon, tritikon k.a. La lago produktas pli ol 40 specojn da fiŝoj kiel karaso, karmo, nigra karmo kaj grandkapa karmo, kaj salikokon, rivermitulojn, akvokaŝtanojn, lotusradikojn k.a.

La feŭdaj regantoj de ĉiuj dinastioj kaj la kucmintangaj reakciuloj tute ne zorgis pri la vivo de la popolo. Pro longtempa neglektado al la akvoreguligaj konstruaĵoj, Huajhe-rivero portis en la lagon grandan kvanton da aluvio, kio plialtigis la fundon de la lago super la ternivelo. En senpluva

sezono la lago sekiĝis kaj dum riverŝveliĝo ĝi inundadis. Post kiam Prezidanto Maŭ faris la alvokon "Nepre jungu Huajhe-riveron" en 1950, la ordigo al Hongze-lago okupis gravan lokon. Ĉi tie oni konstruis sinsekve la kluzon de Sanhe-rivero, la Ĝeneralan Irigacian Kanalon de Norda Giangsu kaj aliajn grandajn kaj mezgrandajn akvoreguligajn konstruaĵojn. Nun la elirejo por diluvo estis larĝigita kaj la vasta ebenaĵo de norda Giangsu estas irigaciebla ankaŭ per la akvo de la lago.

Tajhu-lago situanta en la sudo de Giangsu-provinco antaŭe estis malprofunda maro kaj poste fariĝis lago pro ĉirkaŭo de aluvia delto de Jangzi-rivero. Ĝi havas areon de 2,200 kvadrataj kilometroj.

La klimato ĉe la lago estas varmeta kaj humida. Riveroj, kanaloj kaj lagoj formis tie densan reton. La loko estas renoma kiel "lando de fiŝo kaj rizo" de Ĉinio pro la grundo grasa kaj produktoj abundaj je rizo, tritiko, kolzo kaj morusa silkraŭpo. Ĉi tie la pejzaĝo estas admirinda, trafiko facila kaj distance de Sanhajo nur 80 kilometroj. La famaj

belaj urboj Suĝoŭ kaj Vuhi situas respektive sur la orienta kaj norda bordoj de la lago.

Dianĉi-lago kun areo de 330 kvadrataj kilometroj estas formita de faŭlto kaj situas en la suda antaŭurbo de Kunming de Junnan-provinco. La lago estas ĉirkaŭata de montetoj kaj pli ol 20 riveroj fluas en ĝin.

Ĉe la lago ĉiam estas kiel printempo. Tie abunde produktiĝas rizo, la akva trafiko estas vigla. En la lago vivas karmo, karaso, orfadena fiŝo k.a.

Gingpo-lago kun areo de pli ol 90 kvadrataj kilometroj situas ĉe la supra parto de Mudan-rivero de Hejlonggiang-provinco. Ĝi estas formita el rivero ŝtopita de lafoj post erupcio. La akvo de la lago elfluas en ĝia nordo kaj forkiĝas en du akvofalojn 20 metrojn altajn kaj 40 metrojn larĝajn. Tie oni jam konstruis hidroelektran stacion.

LA ĈEFAJ SALAJ LAGOJ


Kinghaj-lago kun areo de 4,400 kvadrataj kilometroj estas la plej granda sala lago de Ĉinio. La plej profunda loko de la lago atingis 38 metrojn. Ĝi formiĝis pro kolektiĝo de la surtera akvo post enkaviĝo de la tero.


La baseno de Kinghaj-lago estas tre konvena por disvolvo de agrikulturo, paŝtado kaj fiŝbredado. En la lago vivas granda kvanto da senskvamaj fiŝoj kaj aliaj. Apud la lago estas sukoplenaj herbejoj, kiuj servas kiel bonaj kultivejoj kaj paŝtejoj.

Namco-lago troviĝas norde de Lasao de Tibeto, en alteco de 4,627 metroj super la marnivelo. Kun areo de pli ol 2,400 kvadrataj kilometroj ĝi estas la plej alta el la grandaj lagoj de Ĉinio. La baseno havas abundan fonton de sovaĝaj bestoj, kiel sovaĝaj bovoj kaj kaproj. En la lago estas multaj sovaĝaj birdoj.


Lobnor-lago situas en la orienta parto de Tarim-baseno de Hingiang. Ĝi havas areon de pli ol 2,000 kvadrataj kilometroj kaj akceptas la plej longan landinternan riveron Tarim. La lago estas tipa vaganta lago de Ĉinio pro siaj ŝanĝiĝemaj areo kaj formo. En la lastaj pli ol 2,000 jaroj la lago trifoje ŝanĝis sian lokon pro la trifoja alivojiĝo de la malsupra parto de Tarim-rivero. Ĉirkaŭ la lago troviĝas multaj dunoj kaj blankaj salŝeloj, kiuj malhelpas trafikon kaj agrikulturon, tamen la lago liveras salon, alkalon k.a. krudmaterialojn por kemia industrio.

Dongting-lago





1



2




3



4



5



6



7

Sur la kovrilo:

Ĝoja celebrado de la Internacia Festo de Laboruloj en la unua de majo

Sur la dorskovrilo:


Kortobirdejo ĉe la lago

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO
P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 7 (192) 1974

Ĉefa Enhavo

Ĝoja celebrado de la internacia festo de laboruloj	1
Per kio ili venkis la senprecedencan sekegecon?	6
Vang Gjunŝaŭ — eminenta batalanto de laborista klaso	11
Tri maljunaj ekspartizanoj	15
Paŝtistino-kuracistino Rico	19
Vojaĝo sur Baŭtoŭ-Lanĝoŭ-a Fervojo	23
Ĉu Konfucio estis “tutpopola pedagogo”?	27
Kritiko kontraŭ la tezo de Konfucio “fariĝi burokrato post sukcesa sinklerigo”	31
Kritiko de Huang Ŝuaj kontraŭ la tezo de Konfucio pri “digno de instruisto”	34
Batalo ĉe Hiŝa-insularo (Raporto en versoj)	36
Ondoj de amikeco	43
Gaŭŝan-nacieco	45
La lagoj de Ĉinio	48





Abiturientoj de la 34-a Mezlernejo de Pekino venis al Bejhiaŭjing-komunumo de Ŝunji-gubernio por tie fiksloĝi kaj estis bonvenigitaj de tieaj malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj.

Sur la Vojo de Sinkombinado kun Laboristoj kaj Kampanoj

Ĝong Ĝimin, intelekta junulo fiksloĝanta en Ŝaĝoŭba-komunumo de Jujgin-gubernio de Gianghi-provinco, modeste lernas de maljuna kampano teknikon pri kulturado de kolzo.





Junaj laboristoj de la pionira 1202-putobora grupo de Daking-olekampo laboras entuziasme por disvolvi la petrolan industrion de nia lando.



Gialej, tibetana traktoristino de Pengbo-kultivejo de Tibeto

Intelekta Junulino Vej Hong iris al la lernejo de la 7-a de majo kune kun ŝiaj gepatroj por sin hardi kaj sane kreskas. Ŝi jam fariĝis membro de la Komunisma Junulara Ligo kaj laboras kiel ŝpruclakistino en la fabriko dependa al la lernejo.



Ĝang Tieŝeng (la meza), intelekta junulo de Hingĉeng-gubernio de Liaŭning-provinco, nun estas studento de veterinara fakultato de Liaŭning-a Agronomia Instituto.






Juan Guofang (la meza), juna laboristino de la Unua Fridigila Fabriko de Ŝanhajo, kune kun instruisto studas teknikan renovigon en la postlabora lernejo.

Ma Giankuj (la dua de maldekstre), intelekta junulo de Maliankju-komunumo de Vuĝong-gubernio de Ninghia-a Huj-nacia Aŭtonoma Regiono, reveninta sian hejmlokon post lernado, modeste akceptas re-edukon de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Li glorie aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio kaj nun laboras kiel vicestro de la revolucia komitato de la komunumo.





Poštmarkoj

